Flash– ShockWave – Acrobat – RealPlayer – QuickTime – LiveAudio

از بین برنامه‌های فوق برنامه RealPlayer محصول شرکت RealNetworks می‌باشد که برای گوش کردن به موسیقی اینترنتی و رادیوهای اینترنتی و دیدن فیلم در اینترنت مناسب است. فایل‌های مخصوص (صوتی) این نرم افزار(عموماً) ۲ دسته‌اند: جریانی و غیرجریانی.

برای گوش کردن به فایل‌های جریانی که با پسوند "ra" مشخص می‌شوند باید به اینترنت دسترسی داشت، نرم افزار RealPlayer اطلاعات را از شبکه دریافت و آن را پخش می‌نماید و این کار با عمل بافر کردن اطلاعات نیز همراه است، با توجه به این توضیح می‌توان دریافت که فایل‌های جریانی قابل ذخیره سازی روی کامپیوتر نیستند اما می‌توان فایلی را که به محل آن در اینترنت اشاره می‌کند (مثلاً zamenhof.ra) ذخیره کرد. در صورتی که این برنامه را نصب کرده باشید با نوشتن آدرس زیر در مرورگر خود می توانید به صدای زامنهوف گوش دهید.

http://members.at.infoseek.co.jp/amiko465/esp/zamenhof.ra
http://members.tripod.co.jp/amiko465/esp/zamenhof2.ra

★ در نشانی زیر می‌توانید موسیقی‌های مختلفی را به زبان اسپرانتو پیدا کنید. آن‌ها را می‌توانید به کامپیوتر خود انتقال داده و گوش فرا دهید.(بر خلاف فایل های استریمی یا جریانی که فقط می‌توان به آن‌ها گوش داد مانند صدای دکتر زامنهوف در بالا)

www.musicexpress.com.br

★**آموزش آسان زبان اسپرانتو به چند زبان مختلف**

http://www.lernu.net
http://www.lernu.net/lernu.php?lingvo=eo

★**آموزش زبان اسپرانتو برای آلمانی‌ها** :


http://esperantoland.org/de/kurs/mini_arch.html

★ "**اُریگامی**" یکی از هنرهای سنتی ژاپن است. در اُریگامی با تا کردن کاغذ، شکل‌ها و اشیای گوناگونی می‌توان ساخت (مثلا حلزون!) البته در این سایت به زبان اسپرانتو!

http://perso.wanadoo.fr/corobu.mireille/
http://perso.wanadoo.fr/corobu.mireille/heliko.html

★ برای طرف‌داران، آشنایان و سخن گویان زبان اسپرانتو کلمه TEJO (سازمان جهانی جوانان اسپرانتودان)کاملاً شناخته شده است. این هم نشانی TEJO در سرزمین اینترنت : http://www.tejo.org

★ مجله‌ی معروف و معتبر فرانسوی «**لوموند**» در اینترنت به زبان بین المللی اسپرانتو نیز به صورت رایگان منتشر می‌شود. نشانی اینترنتی این مجله معتبر سیاسی به زبان اسپرانتو این است: http://eo.mondediplo.com







جهان اسپرانتو

زیر نظر: نیره ابراهیم‌پور
lumino@sabzandishan.com

چی؟ کی؟ کجا روی خواهد داد؟

به چه طریق می‌توان از محل گرد هم آیی های اسپرانتویی که در کشورهای همسایه یا سایر کشورها، که برگزار می‌شود آگاه شد؟ معمولاً لیست‌های تدوین شده بر حسب تاریخِ برگزاری نشست‌ها، در این خصوص، کمک چندانی نمی کند. Esperantoland در اینترنت نقشه‌هایی را طراحی کرده است که بر روی آن‌ها می‌توان محل برگزاری نشست های اسپرانتویی را به آسانی پیدا کرد. نتیجه‌ی این تلاش در سایت زیر قابل دسترسی است:

www.Esperantoland.org/renkontighoj

جالب این‌جاست که حتی سازمان‌دهندگان این نشست‌ها، شخصاً می‌توانند برنامه‌ی گردهم‌آیی‌شان را در این سایت قرار داده و بعداً به دلخواه موارد لازم را به کمک کدهای ویژه‌ای تغییر دهند. به این ترتیب این امکان وجود دارد که خیلی سریع از طریق اینترنت، حتی بدون در اختیار داشتن صفحات اینترنتی شخصی، دیگران را از گردهمایی خود آگاه کنیم.

کارت پستال ژاپنی

وزارت پست ژاپن در سال ۲۰۰۲ به مناسبت برگزاری هشتاد و نهمین کنگره‌ی ملی اسپرانتوی ژاپن در شهر Hukusima کارت پستال ویژه‌ای را عرضه کرد. این کارت پستال در ۱۱۳ دفتر پستی پخش شد که در کل ۵۰ هزار نسخه از آن فروخته شد. در ژاپن قیمت کارت پستال‌های معمولی ۵۰ ین است، در حالی که بهای این کارت پستال با حمایت موسسه اسپرانتوی ژاپن ۴۵ ین بود. اسپرانتیست‌های ژاپنی به شرکت پست، ۵۲۵۰ ین هدیه دادند. روی کارت متن زیر به چاپ رسیده است: ***"زبان جهانی و مشترک اسپرانتو، زبانی است برای از بین بردن مرز بین کشورها در قلب انسان‌ها".***

کُره‌ی جنوبی

تا مدتی پیش در کره‌ی جنوبی دانشگاه Dankook تنها دانشگاهی بوده است که در آن اسپرانتو رسماً به عنوان رشته ی تحصیلی تدریس می‌شد، اما از ۲۳ ژوئن ۲۰۰۳ دانشگاه Wonkwang، اسپرانتو را وارد سیستم آموزشی خود کرده است.

برزیل

با توجه به آماری که در بولتن موسسه IBOPE (یکی از مهمترین موسسات پژوهشی برزیل) درج شد، برنامه‌ی رادیویی **"اسپرانتو، زبان برادری"**، در بین ۲۲ برنامه ایستگاهِ رادیوی ریو دو ژانیرو، چهارمین برنامه پر مخاطب است. این برنامه را می‌توان هر سه شنبه از ساعت ۳ بعد از ظهر و هر جمعه از ساعت ۱۱ عصر در www.radioriodejaneiro.am.br یا بر روی طول موج ۱۴۰۰ کیلو هرتز گوش کرد.

هندوستان

امروزه ۶۰۰ هزار دانش آموز در مقطع راهنمایی در کل کشور هندوستان، در کتاب‌های آموزشی‌شان، می‌توانند در باره‌ی اسپرانتو، زامنهوف ، سادگی و کاربرد زبان اسپرانتو، همراه با اطلاعاتی مفید و تصاویری رنگی، مطالبی را بخوانند.

لیتوانی

هم‌زمان با برگزاری نودمین کنگره ی جهانی اسپرانتو(Vilnius, 2005)، انجمن اسپرانتوی لیتوانی و هیات سردبیران نشریه "موج اسپرانتو" تصمیم گرفتند که دوره های بازآموزی آخر هفته‌ای را با موضوعات متفاوتی سازماندهی کنند. اولین موضوع انتخاب شده تاریخ اسپرانتو است که Aleksander Korĵenkov در این زمینه ده سخنرانی خواهد داشت. اولین دوره‌ی بازآموزی اسپرانتو نیز از ۲۲ تا ۲۳ فوریه ۲۰۰۳ و دومین دوره از ۲۹تا۳۰ مارس ۲۰۰۳ در خانه اسپرانتو در Kaunas برگزار شد.

نمایشگاه

مرکز اسپرانتویی فرانسه (Angers) قصد دارد در سال ۲۰۰۴، صدمین سالگرد تاسیس‌اش را جشن گرفته و به همین مناسبت، نمایشگاهی از نقاشی کودکان با موضوع **"توسعه‌ی پایدار"** (محیط زیست، مبارزه با آلوده‌سازی محیط زیست، انرژی خورشیدی، دامداری و کشاورزی سالم، آب تمیز، تن‌درستی و ...) برگزار کند که در نهایت به بهترین و زیباترین نقاشی‌ها، جوایزی تعلق خواهد گرفت. برای کسب اطلاعات بیشتر می توانید با نشانی‌های زیر مکاتبه کنید:

Esperanto-centro, A. Frangeul, 6 rue du Buis, FR-49000 Angers. Francio.
Rete: bertrand_gilet@wanadoo.fr

ایران

در ماه‌های اخیر مطبوعات و رسانه‌های خبری ایران اطلاع‌رسانی مطلوبی درباره‌ی اسپرانتو انجام داده‌اند. مصاحبه ی خبرگزاری میراث با دو تن از اسپرانتودانان درباره‌ی تاریخ اسپرانتو در ایران و انتشار آن در روزنامه‌ی همشهری، مصاحبه ی خبرگزاری ایسنا با یکی از اسپرانتودانان و انتشار آن در روزنامه ی شرق از جمله آخرین موردها می‌باشد. در اینترنت نیز اطلاعات، اخبار و مطالب به زبان فارسی درباره‌ی اسپرانتو گسترش قابل ملاحظه ای نسبت به سال گذشته داشته است.★

تازه وارد

نوشته‌ی: دونالد.جی. هارلو

ترجمه‌ی: غلامرضا آذرهوشنگ
azarhushang@sabzandishan.com

دونالد.جی. هارلو در سال ۱۹۴۲ در ایالت اورگون (در شمال شرقی) آمریکا به دنیا آمد. او در رشته نجوم فارغ التحصیل شد. او ۱۲ سال در نیروی هوایی آمریکا خدمت کرد، اما در سال‌های اخیر به‌عنوان متخصص کامپیوتر به کار مشغول شده است. هارلو، از سال ۱۹۵۵ به یادگیری زبان اسپرانتو پرداخت و تاکنون در عرصه‌های مختلف، در جنبش اسپرانتو فعال بوده است. هارلو ازدواج کرده و دارای ٤ فرزند و سه نوه است.

*داستان کوتاه **"تازه وارد"**، درباره‌ی دو دنیای متفاوت است. دنیایی که برای بهبود آن و زندگی در فضایی صلح‌آمیز امید بسیار وجود داشت. (بویژه برای دکتر زامنهوف و اسپرانتیست‌های هم دوره‌ی او) اما در قرن بیستم و با وجود دو جنگ جهانی و سپس ورود به دوران جنگ سرد، متاسفانه سبعیت و جنگ طلبی آزمندانه بر سرنوشت ما حاکم شد. آیا امید انسانی و زیبای دکتر زامنهوف بیهوده بود؟*

دکترِ کوچک اندام تقریبا خوابیده بود، که مردی عجیب در کوپه را باز کرد وخودش را به داخل کوپه انداخت. "ب..ببخشید" و با لکنت زبان، حرفش را دنبال کرد: "من مریض هستم. می‌تونم بنشینم رو صندلی؟"

دکترِ مهربان برخاست و به او کمک کرد تا بنشیند:

" مشگلتون چیه؟"

" فکر می‌کنم بیماری قلبی باشه. قلبم ضعیفه. همین حالا قرص خوردم، توی راهروِ قطار. این بچه‌ی تخم جن ..."

مرد چشمهایش را بست و دستش را روی قلبش گذاشت.

" ببخشید. راستش من نباید عصبانی بشم. به این جور آدما اصلا نباید اجازه بدهن سوار قطار بشن. نکبتی توی واگن سیگاری ها، درست روبروی من نشسته و از پنجره‌ی قطار به بیرون نگاه می‌کنه و داد می‌زنه: "هی، اون جا رو نگاه کنین! مواظب باشین! بمب اتمی داره می‌آد طرفمون. "بمب اتم؛ بر شیطون لعنت! مگه دیگه کسی اجازه می‌ده این ***اتفاق*** دوباره بیفته!"

دکتر چیزی از حرف های او سر درنیاورد، اما سوالی هم نکرد. آن مرد بیمار بود و هنوز نمی‌توانست به سوال‌های او جواب بدهد. شاید چند دقیقه‌ی دیگر...

مرد بیمار، با چشمان نیم بسته، از پنجره به بیرون نگاه کرد. در زیر آفتاب صبحگاهی تابستان، مناظر بیرون زیبا به نظر می آمد. چمنزارها، دریاچه‌ها و جنگل‌ها غرق در رنگ‌های سبز و قهوه ای. این مناظر، در سکوت و آرامش صلح‌آمیز خود، انگار آرام خود را از دیدگاه قطار کنار می‌کشیدند و در جایی مخفی می‌شدند.

دکتر با آن سر طاس، ریش پرپشت و چشمان مهربان از پشت عینک دسته فلزی ظریف خود به مردی که انتظارش را نداشت چشم دوخته بود. این مرد با وجود آن‌که با خودش ستاره‌ی کوچک سبزرنگی را حمل می‌کرد، و به‌نظر می‌رسید یکی از هم‌مسلکان (اسپرانتیست) دکتر باشد، چهره‌ای بیگانه داشت. بیگانه نه فقط با مردم این قسمت اروپا، بلکه بیگانه با تمام جهان، حتی بیگانه با دکتر. او مرد قوی‌هیکلی بود با صورتی جگری رنگ، چشمانی خاکستری و دماغی سرخ که بیشتر به پیاز گل شباهت داشت. موهایش را کوتاه کرده بود؛ کت و شلوار دست خاکستری رنگ عجیبی به تن داشت و کراواتی بد رنگ.

دکتر با تواضع و فروتنی پرسید: "ببخشید آقا... دوست هم مسلک من... شما هم دارین میرین پاریس، برای شرکت در کنگره؟"

نگاهِ مرد عجیب که به زیبایی‌های بیرون دوخته شده بود به‌طرف دکتر برگشت و روی ستاره‌ی بزرگی که به کت او سنجاق شده بود، متوقف ماند.

"کنگره پاریس؟ نه. من دارم می‌رم خونه. اونم بعد از یه سفر *پنهانی*."

دکتر متفرانه لب هایش را لیسید: "ببخشید، آقا! متوجه نشدم. می‌دونین، آخه من یه دکتر ساده هستم. منظورتون رو از *پنهانی* نفهمیدم؟"

مرد گفت: "اگر شما اسمش را بیاد بیاورین..." بعد حرفش را قطع کرد و گفت: "آقای دکتر! شما اهل کجائین؟ البته می‌بخشین که این سوال رو می‌کنم. اما..."

دکتر لبخندی زد و گفت: "من چشم پزشک ساده‌ای هستم و در ورشو زندگی می‌کنم."

"چه شهر قشنگی! قبل از این که منو به خاطر بحران اخراج بکنن، از اون جا دیدن کردم."

"بحران؟"

دکتر سری تکان داد و حرفش را دنبال کرد.

"آن هم در بالکان؟"

مردِ عجیب خندید: "بحران مگه جای دیگه هم می تونه وجود داشته باشه؟"

بعد ادامه داد: "شوخی کردم آقای دکتر. می‌دونستی قیافه تون خیلی به یکی از اقوام ما شبیهِ. ما قبلا همدیگه رو جایی ندیده‌یم."

دکتر اسم خودش را نگفت. حداقل در آن لحظه نمی خواست

خودش را معرفی کند.
"نه. فکر نمی‌کنم."
"مثل این که حق با شماست. اما... شاید من عکس شما رو جایی دیده باشم. به هرحال، اگه شما دارین از ورشو می‌آیین..."
مرد دوباره نگاهش را به بیرون دوخت.
دکتر اصلا سر در نمی‌آورد. بنابراین تصمیم گرفت موضوع را عوض کند: "می‌دونین ساعت چنده؟"
"البته."
مردِ عجیب نگاهی به ساعت مچی‌اش انداخت و گفت: "ساعت..." چینی به ابروهایش انداخت، به ساعتش بد و بیراه گفت و آن را محکم تکان تکان داد. لبخند محوی زد و ادامه داد: " مثل این که از کار افتاده."
دکتر با تعجب به ساعت نگاه کرد. خیلی عجیب بود، ساعت دارای سه عقربه‌ی زمان‌نما و نشانه‌های روزشمار، ماه شمار، سال شمار و به شکل ماه بود. فکر کرد حتما ساعت خراب شده است، چون سال شمارش، سالی اشتباه را نشان می‌داد.
مرد کوچک اندام گفت: "مهم نیست، آقای عزیز." و با انگشت به بیرون پنجره‌ی کوپه اشاره کرد:
"هنوز صبح زوده. طولی نمی کشه که می رسیم به کلن. خیلی هم نیاز به دونستن ساعت دقیق نیست."
"درسته، اما... می دونین، این بهترین ساعت موجوده. سوئیسی یه. متوجه هستین که؟ من کلی پول بالاش داده م. نباید این طوری از کار بیفته."
مرد ساعت را به گوشش چسباند. بعد آن را در یکی از جیب های متعددش گذاشت و گفت: "چیکار می‌شه کرد. حالا که ساعتم نمی‌تونه زمان درست رو به من بگه، من از رادیو کمک می‌گیرم."
مرد جعبه‌ای فلزی را که جلد چرمی داشت از جیب دیگرش بیرون آورد. دکتر فکر کرد: " این مرد چقدر جیب داره." جعبه‌ی غریبی بود. به هیچ چیزی که دکتر تاکنون دیده بود شباهتی نداشت. جلد چرمی، رنگی قهوه‌ای داشت با سوراخ‌های ریز متعدد و دو صفحه‌ی ساعت مانند.
"حالا من رادیوِ خودم رو روشن می‌کنم ."
مرد توضیح گنگی داد: " تا نیم ساعته دیگه، صد در صد رادیو ساعت دقیق رو اعلام می‌کنه."
او یکی از صفحه‌های ساعت مانند را چرخاند. فورا صدای خِرخِری از میان سوراخ‌ها به گوش رسید. مرد آن یکی صفحه‌ی ساعت مانند را نیز چرخاند. صدای خِرخِرِ اعصاب خردکن بی‌وقفه ادامه داشت. مرد گفت: "چرا خِر خِر می‌کنه؟ آهان، فهمیدم." و شکلکی در آورد و گفت: "اطراف ما دیواره‌های آهنی یه، که روی امواجِ رادیویی پارازیت می‌ندازه." و زیر لب گفت: " خیلی متاسفم." و رادیو را به گوشه‌ای انداخت.
مرد دوباره گفت: " می‌دونین، من تکنسین برق هستم. تو آمریکا، تو شرکتی کار می‌کنم که با سیستم‌های برقیِ موشک‌ها سر و کار داره. موشک‌هایی که گاه برای اهداف جنگی بکار می رن، گاه برای اهداف صلح‌آمیز."
دکتر ناخودآگاه سرش را تکان داد وگفت: "اوه، خیلی عجیبه. یعنی می‌خواین بگین که شما سیستم‌هایی رو می‌سازین که می‌تونه هم زمان، چند موشک رو با هم شلیک کنه."
"نه! مگه شما دیوونه شدین آقای دکتر؟ من سیستم‌های هدایتی رو برای موشک‌های قاره‌پیما و موشک‌های فضا پیما رو طراحی می‌کنم. یا برای نیروی هوایی، روی سیستم های داخلی موشک‌هایی کار می‌کنم که اهداف انسانی رو دنبال می‌کنه."

دکتر فورا از جایش بلند شد: " آقا، شما واقعا حالتون خوبه؟ هیچ معلومه اصلا چی می‌گین؟ قدرت برد هیچ موشکی اون قدر نیست که بتونه از یه قاره به قاره‌ی دیگه بره. هیچ‌کس نمی‌تونه این همه *باروت* برای این منظور تامین کنه..."
" *باروت*؟"
مردِ عجیب، روی پاهایش پرید: " آقا، یعنی شما این قدر نادونین که هنوز هم فکر می‌کنین برای موشک از *باروت* استفاده می‌کنن؟ حالا دیگه از اکسیژن مایع، بنزین و چیزهای دیگه استفاده می‌کنن و در آینده‌ی نزدیک می‌خوان از موتورهای اتمی استفاده کنن. ما مثل چینی‌های قدیمی نیستیم. با *باروت* که نمی‌شه موشک های اسپوتنیک رو به فضا پرتاب کرد!"
دکتر در حالی که دستش را روی گوشش گذاشته بود، فریاد زد: " بس کنین، بس کنین آقا! شما نه فقط اشتباه کردین که به جای خین گفتین چین، بلکه شما کلمات زیادی را که اصلا وجود ندارن بکار بردین..."
مرد، نفس عمیقش را بیرون داد و دوباره روی صندلی نشست. بعد از جیبش بطری آبی بیرون آورد، قرصی به دهان انداخت و با جرعه‌ای آب آن را پایین فرستاد.
"من از شما معذرت می‌خوام. این برام قابل درکه که بسیاری از لغت‌هایی که من به‌کار می‌برم برای شما ناآشنا باشه. شما به عنوان یک چشم پزشکِ متخصص، منطقا نباید هم با لغت های رشته‌های دیگه آشنا باشین. حتی در رشته‌ی خودم هم کسانی هستن که هنوز با لغت اسپوتنیک آشنا نیستن."
دکتر با گلایه گفت: " ***من*** که نمی‌دونم، اگه این لغت از زبان روسی اومده باشه، تا اون جایی که من می‌دونم، معنی‌اش می‌شه " همراه "، اما من فکر نمی‌کنم که..."
"حقیقتش مسئله دقیقا همینه. شما لابد می‌دونین که اسپوتنیک در واقع همون ماه مصنوعی‌یه."
دکتر نتوانست جلو خنده‌ی خود را بگیرد: " ماه مصنوعی؟ به حق چیزهای نشنیده! مگه ممکنه؟"
"کسانی هم بودن که معتقد بودن زبان مصنوعی ممکن نیس. اما زامنهوف خلاف این رو ثابت کرد."
دکتر ناگزیر اقرار کرد: " بله، درسته."
این عقب نشینی بیش از انتظار بود. دکتر ادامه داد: " اما... اما زبان امری‌یه مربوط به جامعه انسانی؛ در حالی‌که ماه به طبیعت مربوط می‌شه."
"ماه کوچک مصنوعی، نه. خیلی واضحه که اسپوتنیک به طور نسبی چیز کوچیکی‌یه، اما تونسته هر دو طرف درگیر در " ***جنگ سرد*** " رو وادار کنه که دقیقا به سمت همین ماه‌های مصنوعی کشونده بشن ..."
ناله‌ی دکتر بلند شد: " آقا، من که نمی‌فهمم معنای این کلمات چیه؛ و به چه موضوعی مربوط می‌شه. مثلا معنای همین کلمه ی ***جنگ سرد***؟"
"مگه شما نمی‌دونین؟ این مربوط به وضعیتی می‌شه، تقریبا شبیه در آستانه‌ی جنگ بودن. چیزی که بعد از جنگ جهانی دوم بین آمریکا و اتحاد جماهیر شوروی به وجود اومد."
" اتحاد جماهیر شوروی؟ این دیگه چه معنی می‌ده، اتحاد گرد آمدگان؟"



IRANA ESPERANTISTO
Pajam-e Sabzandiŝan
Kultura Sezon-revuo en la persa kaj Esperanto
N-ro: 5 Jaro: 2 Aŭtuno 2003

Damavand, Alta Kaj Fiera, Simbolo De Irano

Ŝirin Ebadi
La Unua Irana Nobel-Pac-Premiito

Rumi, Nia plej Granda Mistika Poeto

ESPERANTO
Kompleta enhavo de la revuo senpage
www.sabzandishan.com
Baldaŭ

Pajam-e Sabzandiŝan(*Mesaĝo de Verdpensuloj*)

ISSN 1728-6174

Kultura sezon-revuo en E-o kaj la persa. En E-mondo ĝi aperas sub la nomo:

IRANA ESPERANTISTO

IRANA ESPERANTISTO estas sendependa kultura revuo kiu presiĝas en Irano.

Respondeca direktorino :
Fariba N. Maĝd
Ĉefredaktoro :
M. Reza Torabi



Kovrilo:
Panoramo de ***Damavand-monto***

•

Persa kovrilo:
Temas pri Ŝirin Ebadi

•

Grafikaĵo: Babak Torabi
Eldonaj aferoj: *Reza Haĝihasanlu*
Eksterlanda abono: *Hamzeh Ŝafii*

•

Adresoj:
P.O.Kesto 17765-184,
Tehran, Iran
Telefono : (0098 21) 7437138
Fakso : (009821) 7463812
TTT-ejo : www.sabzandishan.com
Retpoŝto: info@sabzandishan.com

•

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuaĵoj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj kontribuaĵoj ĉu en Esperanto ĉu en la persa.

Enhavo:

Persa parto :

Enkonduke…

Fine la unua semajno de Oktobro. Ĉiuj partoj de la revuo estas pretaj. Baldaŭ ĝi estos sendita al presejo…

Neatendite surprizia novaĵo… Nobela Pac-premio…Irano…Ŝirin Ebadi… Kion ni faru? Silenti ne eblas. Ni kiel Esperantistoj, kiel movado de pac-defendantoj ne povas ne reagi. Venas amaso da gratul-mesaĝoj el foraj kaj proksimaj partoj de la mondo. Tio montras ke la Esperantistaro de la mondo ne estas indiferentaj pri la aferoj pac-rilataj… Tiel estis ke ni decidis aldoni kroman 8 paĝojn dediĉita al tiu ĉi grava evento; malgraŭ 8-paĝa jam aldonita parto. Aparte grava estas ĉi-jara pac-premio pro tio ke ĝi estas unika de diversaj flankoj: La unua Nobel-premio por Irano…pli grave ke ĝi estas donita al virino…ankaŭ grava pro tio ke ĝi estas pac-premio al civitano de lando kie oni propagandas kiel fonto kaj subtenanto de terorismo. Tio montras ke homojn oni ne povas juĝi amase, sed individue. Kaj ke ne ĉiuj estas samaj… .

Sur aliaj paĝoj vi legos kiel regule pri diversaj kaj variaj aferoj, de anekdoto ĝis poemo, kaj de lingvo ĝis ludo. Perslingvanoj povas ĝui interesajn kaj informodonajn artikolojn en la persa parto.

Hamzeh Ŝafii

Al tiu kiu foren donas sian liberecon, por ĝin havigi al aliaj.

Al Farhadeca Ŝirino*

Vi kiu gajnis pac-premion,
Certe pasigis malpacajn premojn.
Kiam vi defendis malfortulojn
Vi ĉiam frontis la fortegulojn.
Se iam aperis problemo al vi
Vi nur provis solvi ĝin perpace.
Al plej danĝeraj frontoj vi iris
Por savadi sendefendulojn.
Advokatino alvokanta juston
Savantino liberiganta homon
Leĝon ĉiam vi respektis
Kvankam por fari tion
Vi dev-suferis neleĝon.
Feliĉe jam ekburĝonis
Klopodoj egaj viaj
Ĉar alia geniulo
Alfred Nobelo la nobla
Pli ol cent jarojn antaŭe
Angoradis pri ĉiuj vi
Kiuj pacon disvolvigus.
Restu en paco animo lia
Dum vi kaj viaj aliaj anoj
Zorgas pri la homaj rajtoj.
De-nun poste pli esperu
La infanoj kaj virinoj
Je sia helpa advokatino.

Asad Mahbub

* Ŝirin kaj Farhad estas unu el la plej famaj geamantoj en la persa literaturo. Farhad por atingi al sia amatino, Ŝirin, akceptas la kondiĉon de sia rivalo, Ĥosro t.e. fari vojon tra ŝtona monto per sia hakilo. Farhad estas simbolo de senlaca laborego celen. La am-historion poeme rakontis Iljas ebn Jusof Nezami de Ganĝe (1072-1202) konata je Nezami Ganĝavi en sia longa epopeo Ĥosro kaj Ŝirin

Nova proverbaro

verkis: **Morteza Mirbagian**

Niaj pensoj nin trompas, kaj niaj sentoj nin rompas.
Oni diru vorton kiu egalas arĝenton, alie prefereble tenu silenton.
Al la vulpido kaptita en truo, ne plu helpas ĝia patra instruo.
Riĉuloj kiuj regas post la kurteno, preferas azenojn sur la politika sceno.
Pli ol kruelaj reĝoj, vundas maljustaj leĝoj.
Kiu konstante parolas pri bono, estas aŭ sankta ulo, aŭ fripono.
Mizero estas doloro, sed ne estas malhonoro
Kiu donas amon, meritas la samon.
Por kadukulo, morto; egalas al komforto.
Kie sukero, tie formikoj, kie sufero, tie amikoj!
Arbo falas pro manko de fortaj radikoj, homo falas pro manko de bonaj amikoj.
Kiu havas belajn okulojn, freneze amas spegulojn.
Amo estas supo varma: ju pli varma, des pli ĉarma.
Amo blindigas okulojn, kovras amatinajn makulojn.
Arbon rompas vento-potenco, homon rompas nigra penso.
Arbo falinta ne havas radikojn, homo falinta ne havas amikojn.
Multaj homoj imitas la abelojn, dorse pikas dum buŝe donas mielojn.
Jen fidelaj amikoj de ĉiu persono, malnovaj edzino, hundo kaj preta mono.
Al la bezonoj de la kokino, infano kaj virino mankas fino.
Kiam infano agadas stulte, tiam bezonas amon plej multe.

Afgana Pioniro

Afganio estas lando kiun la mondo estis jam forgesinta de antaŭ longaj jaroj ĝis tiam kiam post sangverŝaj interbataloj enlande, aperis "Talebanoj" kiuj prezentis la plej radikalan Islamon kaj de tiu jam aperis minacoj akraj kontraŭ la cetera mondo kaj tiel la mondo jam komencis konsideri Afganujon kaj ties problemaron … .

Pri E-movado ĝis 1981 nenion oni povas trovi en Afganio kaj ĝuste en tiu jaro aperas la unua esperantisto kiu estas d-ro Hejdar Raŝidi (Heydar Rashidi). Li naskiĝis en 1920 en Kabulo, la ĉefurbo de Afganio.

D-ro Raŝidi estas kuracisto kiu aŭtodidakte eklernis E-on kaj komencis disvastigi la lingvon okazigante E-kursojn en Kabula Universitato sed pro la enlanda milito kiu trapasis la tutan landon li devis forlasi la patrujon kaj rifuĝi al najbara lando Irano kiu kompare kun Afganio estis pli sekura (Dum tiu jaro komenciĝis milito inter Irano kaj Irako sed la situacio kompare kun Afganio estis ankoraŭ pli tolerebla).

Kaj tiel la movado kiun d-ro Raŝidi komencis en Afganio rapide stagnis sed li mem neniam forlasis E-on. Li verkis multajn librojn pri sia fako medicino kaj radiologio kaj dum kelkaj jaroj redaktis fakgazeton pri medicino kiu eldoniĝis en Kabulo. Pli ol 500 eseoj kaj artikoloj de li jam estas eldonitaj en diversaj revuoj kaj gazetoj. Post sia rifuĝo al Irano li eldonis lernolibron de Esperanto en la persa kaj ankoraŭ restas ne aperintaj libroj Germana-Persa-Germana Vortaro kaj Esperanto-Persa-Esperanto vortaroj kiujn li jam finredaktis. Li ankoraŭ plenenergie aktivas kaj verkadas. La revuo Esperanto en aprilo 1998 aperigis intervjuon kun li. Li ofte plume kontribuas al Irana E-movado kaj estas membro de Irana Esperanto-Centro. En majo 2003 fondiĝis Afgana Esperanto-Klubo (AFESPO) en Maŝhado kaj d-ro Raŝidi kiel la patro de Afgana E-movado estis renomita kaj respektita de Afganaj rifuĝintaj gejunuloj kiuj laŭ la projekto "lingvo de paco" subtenita de Universala Esperanto-Asocio kaj Irana Esperanto-Centro, eklernis E-on kaj jam komencis movadumi. Respektante la agadojn de nia Afgana samideano ni aperigas erojn de lia verkaro en nia revuo.★




Foto de: Kejhan Sajjadpur

Panjo…

Kiam mi vidis vian fantomon
Tre rapide batis mia koro.
Mi volas kisadi vian manon
Ĉar mi amas vin kiel amanto.
Kion deziras vi kara mia
Ordonu al mi, mi faros ĉion.

D-ro H.Raŝidi

Nur la Amo:
Rumi (Moŭlana), La Plej Granda Mistika Poeto

Ahmad Reza Mamduhi mamduhi@sabzandishan.com

Verkinte tiel belajn kaj profundajn poemojn en la plej diversaj formoj kaj ritmoj, Rumi negemas kaj ignoras poemikon - en siaj poemoj! Ekz-e:


Rimon mi elpensantas sed diras mia amatino:
"Krom mian ekviziton, pripensadu vi nenion!"
Disordigu mi versduon, ritmon kaj rimon,
por ke parolivu kun vi for de tiu ĉi trio!

Ĝalal-ed-din Mohammad (1207-1273) estas la plej granda mistika poeto. En la okcidento oni konas lin kiel Rumi (ĉar loĝinta ĉefe en Rum, t.e. en Malgrand-Azio, Turkio) kaj en Irano kiel Moŭlana (ĉar liaj sekvantoj nomis lin tiel, laŭvorte: "nia mastro") aŭ Moŭlavi (turka prononco de Moŭlana). Liaj poemoj jam tradukiĝis en multajn lingvojn kaj li estas unu el la plej legataj poetoj diverslande inkluzive okcidenton kaj Usonon, nun.

Inter la perslingvaj poetoj, Rumi havas la plej ampleksan verkaron. Li havas ses famajn verkojn. Unu el ili, la 6-voluma Masnavije Ma'navi t.e. spirituala masnavio*(1), konsistas el 25,000 poemlinioj aŭ rimaj distikoj. Fakte en la persa lingvo oni proverbe similigas ĉiun tre

> ***Vino de ni ebriiĝis, ne ni de ĝi!***
> ***Moldo de ni ekestiĝis, ne ni de ĝi!***

longan rakonton aŭ historion al "Masnavio 70 menojn*" (ĉiu meno* egalas 3 kilogramojn). Ankaŭ pro la tre alta populareco de tiu ĉi verko, kiam oni diras "Masnavio", tio signifas la verkon. Por kompareto tempa kaj volumena: La Dia Komedio de Dante (1265-1321) estis



verkita preskaŭ duonjarcenton post Masnavio kaj havas proksimume duonan volumenon de ĝi (2).

Krom sennombraj iranaj kleruloj, kiuj esploris multege pri Rumi – el kiuj eble la plej elstara estas B. Foruzanfar (1899-1979) - jam ankaŭ pluraj tre grandaj okcidentaj orientalistoj dediĉis multe el siaj vivoj al kon(ig)ado de Rumi kaj liaj verkoj, precipe

Masnavio. Kiel ekz-o, profesoro R.A. Nicholson(1868-1945), elp.Nikolson, verkis tre multe pri Rumi kaj liaj ĉefverkoj, kaj ankaŭ tradukis anglen multajn poemojn de li (i.a. li tradukis tutan Masnavion kaj verkis kompletan interpretadon pri ĉiuj ties ses volumoj!).

"... Sen ĉia ajn dubo, Nicholson estas la plej granda Rumiologo okcidenta, kies anglalingvaj studoj kaj verkoj ankoraŭ estas sensimilaj, kaj verŝajne ne aperos alia orientalisto kiel li. Liaj plej grandaj verkoj estas pri Moŭlana, ..." (3)

Bedaŭrinde lia forpaso ne lasis lin finverki la enkondukon al sia lasta libro pri Moŭlana nomata Rumi, Poeto kaj Mistikulo (4). La libro entenas tradukojn elektitaj el diversaj verkoj de Rumi kun klarigaj notoj celante prezenti ĝeneralan bildon kaj konon pri sufiismo (5). Feliĉe, A.J. Arberry (1905-1969) – mem ege kompetenta esploristo kaj nomanta sin lernanto de Nicholson – preparis la libron por presiĝo aldoninte du alineojn je la fino de la nefinita enkonduko. Arberry en la plej lasta alineo de la enkonduko belege esprimas siajn admiron kaj laŭdon kaj pri Rumi kaj pri Nicholson:

"*En Rumi, la persa mistika genio trovas sian plej superan esprimiĝon. Rigardante al la vasta pejzaĝo de sufia poezio, ni vidas lin kiel subliman montopinton, dum la aliaj poetoj – tre multnombraj – ĉu antaŭ li, ĉu post li, estas nur montetoj, en komparo. La influado de lia imitinda ekzemplo, lia pensmaniero kaj lia lingvouzo estas forte sentata dum ĉiuj post-liaj jarcentoj; ĉiu sufio post li, kapabla legi la persan, agnoskis lian nekontesteblan gvidantecon. Por la okcidento, kiu nun estas malrapide konstatanta la grandecon de lia genio – dankeg' al la laboro de la subtila klerulo, kies lastaj skribaĵoj trovas sin en tiu ĉi verko – Rumi estas tute kapabla aperi kiel fonto de inspirado kaj ravo nesuperita de kiu ajn alia poeto en la literaturo de la mondo."* (6)

Kiel vidite, Arberry tre diligente antaŭdiris la okcidentan logiĝon al Rumi, jam en 1950! Ankaŭ Arberry multe verkis pri mistikismo, sufiismo, Rumi kaj aliaj mistikuloj.

La alia verko de Rumi, nomata Ŝams-Gazalaro enhavas 3229 gazalojn! Kiel ekz-o, traduko de unu el liaj gazaloj prezentiĝas kun tiu ĉi artikolo. Por lia elkono, laŭ la poemo de li mem, oni devas esti tre atentema tiel ke oni bezonas ekpovi vidi per siaj oreloj:

Mi estas nur spegulo, ne la viro de l' diradoj,
Jam vidiĝos mia stato, se okuliĝu viaj oreloj.

Li uzis la lingvon okulfrape sia-stile, libereme kaj fakte logikige - iele Esperantece - t.e. ĝeneraligante kaj utiligante regulon por kazoj, kiajn neniu uzis antaŭe tiuregule. Por doni ekzempleton, kiu eble iome induktu lian lingvouzon, jen la supra versduo en pli fidela traduko al la persa Rumia originalo:

Spegulas mi, spegulas mi, ne dirviras mi,
Jam vidiĝos mi, se okuliĝu l' oreloj al vi.

Li naskiĝis en Balĥurbo. Ĉiuj liaj praŭloj estis Ĥorasananoj. Kvankam li pasigis plejmulton de sia vivo en Konja-urbo (tiame nomata Iconium), li ĉiam menciis en siaj poemoj pri Ĥorasano. Sed tio neniel indus interpretiĝi tiel ke en lia esto ekzistis plej eta signo de ŝovinismo, naciismo, k.s., ĉar li ja superis ĉiajn malgrandskalajn temojn supraĵajn kiel tiuj ĉi, kaj li senhezite, plenenergie kaj tiel bele esprimas:

Lin demandis mi: "Kio estas via
deveno?" mokete diris li:
"Ho mia kara,
duono de mi devenas de turkujo,
duono de mi de Forganeo
duono de mi estas el koto,
duono de mi el anim' kaj koro
duono de mi ĉeas la maron,
duono de mi tute el perlo

Lia patro, kiu nomiĝis Valad, estante tre renoma kaj populara en Balĥo, deviĝis elmigri el la urbo kelkal: unue ĉar la reganto tiea, M. Ĥarazm-Ŝaho, timige ĵaluzis lian polularecon inter la regatoj; due ĉar Imamo

Pinte de sia renomo, Rumi forlasis sian tre altan socian staton, nur pro amo.

Faĥr-Razio, tiama kaj tiea altreligiulo, ĝuanta bonan interrilaton kun la reganto, kontraŭis Valadon, kaj trie por ke la Mongola invado minacis orient-iranajn klerulojn, kiel Damokla glavo. Sekve, kiam

Rumi estis ankoraŭ 12 aŭ 13jara, elmigris kun sia patro el Balĥo pilgrimonte al Mekko. Forlasinte la naskiĝurbon, ili unue atingis la survojan urbon Nejŝaburon, kaj tie vizitis ŝejkon F. Attar (1119-1229?) – famega poeto kaj tre brila vizaĝo en la mistikismo kiu instruis kaj/aŭ inspiris multajn post-siajn mistikulojn. Jarojn poste, Rumi tiel pripoemis Attaron:

Attar transpasis jam la urbsepon de la am'.
Ni ankoraŭ mezirantas aleeton l' unuan.

Post kiam ili forlasis Mekkon, ekloĝis en Malgrand-Azio, ĉar orienta regiono de Irano jam estis invadita de mongoloj. Post iom da tempo, Kejgobado, la selĝuka reĝo, invitis ilin al Konja, kie ili loĝis pleje dum sia vivoresto. Rumi edziĝis 18-jaraĝe kaj perdis sian patron 24-jaraĝe. En la sama jaro, t.e. 1231, la sekvantoj de Valad petis lian filon anstataŭi la patron kaj ekgvidi ilin.

Rumi pasigis sep jarojn en Halabo kaj Damasko daŭrigante siajn studojn. Post tio dum kvin jaroj li instruis en Konja, kaj liajn instruojn, utiligis pli ol 400 lernantoj! Nun li estis tre fama teologo kaj instruisto plenestimata.

Viglo, vivemo kaj melodio en liaj gazaloj estas unike movaj.

Kiam Rumi estis 38-jaraĝa, Ŝams-ed-din Mohammad de Tabrizo (1185?-1247), vagabonda dervîŝo mistika - famiĝonta je Ŝams - venis al Konja kaj ilia renkontiĝo kaŭzis elradikan aliiĝon al Moŭlana, kvazaŭ li renaskiĝis. Rumi tiel absorbiĝis al personeco kaj pensmaniero de Ŝams, ke forgesis ĉion pri sia socia stato kaj populareco, ekkondutante tre senzorge rilate al sia reputacio ĉe sia jam tre granda sekvantaro, kaj fariĝis mistikulo sufia. La sekvantoj de Rumi, vidinte la eklogiĝon de sia mastro al Ŝams, kaj senigitaj de karaj instruoj de "sia mastro", komencis kontraŭi kaj ĝeni Ŝamson, tiel ke post 16 monatoj, li foriris el Konja al Damasko.

Rumi, tro-ĝenita de la disiĝo, poemis multe pri la apartiĝo kaj sopiro retrovi Ŝamson, kaj sendis sian filon, Soltan-Valadon, kune kun 20 el la sekvantoj - kiuj jam estis pentintaj pro siaj miskondutoj kontraŭ Ŝams - al Damasko por inviti lin al Konja. Fine, post 15-monata foresto, li denove estis ĉe Rumi. Sed pro la fanatikeco de la popolamaso, kaj priklaĉoj kaj ĝenadoj, li denove deviĝis forlasi Konja-on, kaj ĉifoje laŭŝajne por ĉiam, ĉar de post tio, neniaj spuroj de li estas trovitaj en la historio.

Gazalojn, kiujn Rumi verkis inspirite de Ŝams – ĉu dum lia ĉeesto ĉu dum lia foresto - Moŭlana nomis Ŝams-Gazalaron. La mistikecan kialon por tia nomado, Nicholson klarigas tiel ĉi: unu el la ĉefaj principoj en sufiismo estas unuiĝo kaj unueco de amanto kaj amato; do post ekamo inter Moŭlana kaj Ŝams, ili estis sama persono: ili estis unu spirito en du korpoj, Ŝams estis la alia memo (*alter ego*) de Rumi: sekve Ŝams signifis Rumion, kaj Rumi estis Ŝams!

NOTOJ:

1.Riman versduon en la araba kaj persa oni nomas masnavio*, kio laŭlitere signifas duopo-n.
2.Paĝo 273 de la verko n-ro 8 en la Fontoj.
3.El la paĝo sepdek de la verko n-ro 3 en la Fontoj.
4.Verko n-ro 1 en la Fontoj.
5.Laŭ la plej akceptita etimologio por tiu ĉi vorto, Sufio* estas derivita el araba vorto suf signifanta lanon. Ĉar sufioj iam vestis lanan robon; ili dediĉas sin al la mistika vivado. Sufiismo estas la mondorigardo kaj vivmaniero de sufioj. Pri skolo de ĝi bv. vd. Esperant-lingvan artikolon menciitan en la Fontoj, n-ro 7.
6.El la paĝoj 25-6 de la verko n-ro 1 en la Fontoj.

Fontoj:

1.Anglalingva verko: NICHOLSON, Reynold A. Rumi, Poet and Mystic 1207-1273, London: George Allen & Unwin ltd, 1973 (6a eld.), {1a eld. 1950},190 p.
2.Perslingva verko: Gozideje Gazalijjate Ŝams (Elektitaj Gazaloj de Rumi), selektado, enkonduko kaj notoj far d-ro M. R. Ŝafi'ije Kadkani, 6a eld., Tehrano: Ketabhaje Ĝibi, 1986, 632 p., entenanta 466+7 Gazalojn.
3.Persa traduko de NICHOLSON, Reynold A. The Idea of Personality in Sufism (La Ideo de Personeco en Sufismo), "Tasavvofe Eslami" trad. kaj enkonduko far d-ro M. R. Ŝafi'ije Kadkani,Tehrano: Tus-eldonejo, 1979, 254 p.
4.La Nobla Korano, Trad. Italo Chiussi, 2a eld, Kopenhago: TK, 1970, 20+677 p.
5.www.rumi.net
6.www.khamush.com. Tiu ĉi fonto enhavas multajn materialojn pri kaj de Rumi en 11 lingvoj. Rumi estis konata ankaŭ kiel Ĥamuŝ (Khamush) kio signifas silenta-n.
7.SHAHMAGSUDI, M.T.O. Sufiismo: la vojo al Dio, Trad. Ĵila Sadigi, Kontakto, n-ro 191 (2002:5), p.10.
8.Perslingva verko: d-ro Zarrinkub, A. Ĝostoĝu dar tasavvofe Iran (Esplorado pri Sufiismo en Irano), Tehrano: Amir-kabir, 1984 (2a eld.), (1a eld. 1978), 446 p.

Unu Gazalo el Ŝams-Gazalaro far Rumi (Moŭlana)

Eble tiu ĉi gazalo estas la unua verko de Rumi, kiu eldoniĝas E-te. Certe la traduko ne malhavas mankojn, ĉar unuflanke la tradukinto ne spertas en poezio kaj nur la amo al Moŭlana kaj la sopiro prezenti lian vastegan mondo(vido)n al la samideanoj, tradukigis lin kaj aliflanke la Rumiaj verkoj plenplenas de plursencaj kaj profundaj signifoj, kies traduko certe estas tasko malfacilega – se ne malebla! Feliĉe la tre forta esprimivo kaj alta fleksebleco de Esperanto estis grandaj helpoj kaj kuraĝigoj por la tradukinto. Ĉiuokaze proponoj kaj plibonigoj certe estas tre bonvenaj!



Ho amanto, forlasu ruzon, freneziĝu freniziĝu
Ekenvenu en fajrokoron, faleniĝu faleniĝu (1)
Kaj fremdiĝu al via memo, kaj detruu al vi la domon
Post tio venu, kaj kun amantoj, samhejmiĝu samhejmiĝu
Vian sinon, kiel la sinoj, tutpurigu je rankoroj
Poste por la amovino, pokaliĝu pokaliĝu
Vi devas tutanimiĝi, por indiĝi je animuloj
Se vi iras ebriulojn, ebriiĝu ebriiĝu
La orelringo de belulinoj, kunparolantiĝis ties vizaĝojn
Se vi sopiras tiujn orelojn, kaj vizaĝojn, ekperliĝu ekperliĝu
Se soris supren, spirito cia, pro fabelo dolĉa nia
Neniiĝu, kaj kiel amantoj, fabeliĝu fabeliĝu
Nun vi estas, tombnokte sombra, celu fariĝi gadr-nokte (2) ***gaja***
Kaj kiel la gadro-nokto, vi spiritojn, loĝejiĝu loĝejiĝu (3)
Penso via iras ien, poste tiras vin al tie
Penson advancu, kaj sorteske, antaŭiĝu antaŭiĝu
Al ni la korojn, serure fermas, dezir' kaj kapric'
Ŝlosiliĝu, la ŝlosilon dentetiĝu dentetiĝu
Kolumnon la ĝemantan, eksonigis Mostafa-lumo (4)
Ne malplias vi lignaĵon, ĝemantiĝu ĝemantiĝu
Vin Salomono aldiras: "Aŭskultu la birdolingvon
Vi kaptilas, birdfuĝigas, eknestiĝu eknestiĝu" (5)
Se amatino vizaĝon montris, je ŝi pleniĝu spegule
Kaj se al si hararon ŝi ovris, kombiliĝu kombiliĝu
Ĝis kiam ture nur dubranĉa, ĝis kiam peone mallongira
Ĝis kiam vi dame iras oblikve, sciuliĝu sciuliĝu (6)
Vi jam fordonis multajn dankaĵojn pro la amo, el havaĵoj
Forlasu havaĵojn, vin mem fordonu, dankaĵiĝu dankaĵiĝu
Iomtempe vi elementaris (7)***, por iom da tempo vi animalis***
Iomon da tempo animeskiĝu, animuliĝu animuliĝu (8)
Ho parolulo (9)***, ĉesigu iri al pord' kaj tegment', flugu hejme*** (10)
Jam forlasu vi, parolon perlangan, senbuŝiĝu senbuŝiĝu

Esperantigis: Ahmad Reza Mamduhi

***NOTOJ*:** **1.**En la persa literaturo kaj mistikismo, freneziĝo signifas forlasi kalkulemon kaj zorgojn kaj for de ĉia saĝo, nur tut-enamiĝi en la amaton, tiel kiel ankaŭ la falenoj dumnokte alflugas la kandelflamon kaj pro sia amego al lumo, pretas ĉirkaŭflugi ĉeiĝante la flamon kaj eniri fajroflamon senzorge kaj … mortiĝonte. **2.**Gadr-nokto aŭ kadr-nokto, estas tre speciala nokto en Islamo, dum kiu ĉies deziroj ekrealiĝas sekve de sinceraj preĝoj tiunoktaj. Prof. d-ro Italo Chiussi, en sia E-a traduko de La Nobla Korano, por gadrnoko utiligis la frazon: "la nokto de la Dia dekreto". **3.**Laŭ La Nobla Korano (ĉapitro 97/verso 5), dum la gadrnokto la anĝeloj kaj la spirito venas malsupren sur la teron, do la nokto enloĝigas ilin. **4.**Mostafa estas unu el la nomoj de la islama profeto. Laŭ la historio de lia vivo, li predikante kutimis apogi kontraŭ iu seka trunko de daktilpalmo. Poste, kiam oni faris katedron por li, tiu trunko, foriĝinta de la profeto, komencis soni/ĝemi pro la ĉagreno, tial ĝi famiĝis je "la ĝamanta kolumno". **5.**Laŭ La Nobla Korano (ĉapitro 27/ verso 17), Salomono diris: "Ho vi homoj! Al ni estis instruita la lingvo de la birdoj, kaj al ni ĉio estas donita." **6.**Movmanieroj de ŝakpecoj estas metafore utiligitaj ĉi tie: tiuj de turo, peono kaj damo, simbolas sklavecean, monotonan kaj rutinan vivmanieron, kio nur for(ges)igas onin de si mem, kaj tiele baras al oni la sciuliĝon. **7.**La elementaron, laŭ la antikvaj persoj, konsistigis la akvo, vento, fajro kaj tero, t.e. senvivaj estaĵoj kontraste kun vivaj plantoj kaj animaloj.**8.**Komence vi estis senviva (t. e. elementaro), poste fariĝis vivanta (animalo) kaj sekve vi iĝis simila al animo kaj trovis homan spiriton, nun provu iĝi eĉ pli supreca, t.e. tutanimiĝu, animuliĝu! **9.**Parolulo signifas homon, ĉar la homo estas la nura animalo kiu povas paroli. **10.**Ĝis kiam vi vane iras tien kaj tien serĉante veron? Fokusu vin mem, ĉio tieas.

Sekvi la Majstron interrete


Nun ekzistas granda trezoro de verkoj pri kaj en la Internacia Lingvo, sed por multaj antaj kaj untaj Esperantistoj ne ekzistas facila alirebleco al ĝi. Certe se facila kaj malkara alirivo ebliĝu al la publiko, Esperanto-komunumo ekkreskegos kaj kvante kaj kvalite.

Senpaga alirebleco al la E-a literaturo en la interreto havos pluraspektan rezultaron por diversaj E-istoj kaj neE-istoj: de ekstermondanoj, kiuj povus trovi fortan motivon por eklerni la lingvon, tra jam E-istoj kiuj povus plifundigi sian konon kaj scion pri la lingvo, ĝis la verkistoj, kiuj ekdisponus grandegan inspir-fonton. Feliĉe tia senpaga alirebleco al la E-aj materialoj en la interreto – dankeg' al nia diligenta kolegaro – jam ne estas malmulta, sed, tion endus plenumi en pli granda kiomo kaj pli organizita kielo.

Senpaga prezentado de diversaj verkoj pri kaj en Esperanto al la publiko pere de interreto, disvolvigos la movadon konsiderinde.

Nun interreto disponigas la eblecon preskaŭ senpage kaj prezenti kaj utiligi intelektajn materialojn. Tion ni devus inde ekspluati ĝiseble. Ĝis antaŭ la inventiĝo kaj populariĝo de interreto, oni devis elspezi multon por prezenti sian verkon al la publiko, sed nun oni povas fari tion tre tre malkare dank' al la interretaj rimedoj.

Profesoro Luis Guillermo Restrepo Rivas, specialisto kaj esploristo pri artefarita intelekto, aŭtomata tradukado kaj robotiko en Politeknika Universitato de Kolombio kaj instruisto pri interreto, jam - kaj tre adekvate- proponis senpagan kaj



Nia majstro, d-ro L.L. Zamenhof, dediĉis sian vivatingaĵon, t.e. Esperanton, al la homaro; ĉu ne indus ke ankaŭ ni faru similon pri niaj verkoj lia-lingvaj!? Kaj tiel kontribui efike al la fina venko?

senkopirajtan disdonadon de la E-aj lernolibroj kaj legolibroj pere de interreto (Esperanto, n-ro 1155/1, Jan. 2003, p.11), tamen, fakte la ĉefan motivon por la eklernado mem de la lingvo - aŭ por ĝia utiligado en praktiko - kaŭzus la facila kaj senpaga alirebleco al vere utilaj materialoj interesaj en ĉiuj terenoj, kiel beletro, sciencoj,… en E-o. Tutklaras ke se oni povu konvinki iun pri tio ke tion kion – kaj esperebIe iam, tiom kiom – li/ŝi nun povas atingi utiligante la anglan, li/ŝi povas disponi ankaŭ pere de Esperanto, la motivo por eklerni kaj utiligi nian lingvon fariĝas multobla. Ĝangalo (www.gxangalo.com) estas bona provo en tiu ĉi direkto.

Kiel guteto, ni kontribuos al tio, pere de prezentado de la kompleta enhavo de nia revuo, Irana Esperantisto, en la interreton kaj senpaga alireblo al ĝi por la publiko (www.sabzandishan.com). Ni esperas ke

Profesoro L.G.R. Rivas jam - kaj tre adekvate - proponis senpagan kaj senkopirajtan disdonadon de la E-aj lernolibroj kaj legolibroj pere de interreto, tamen, fakte la ĉefan motivon por eklernado mem de la lingvo kaŭzus la senpaga alirebleco al vere utilaj materialoj interesaj en ĉiuj terenoj kiel beletro, sciencoj, … en E-o.

samon aŭ similon faros la aliaj posedantoj de la E-aj materialoj. Ekz-e, librojn aŭ revuojn oni povas tiel disponigi al la samideanaro - kaj al la ekstera mondo, se temas pri nacilingvaj - almenaŭ post certa tempo ekde ilia eldoniĝo, t.e. post jaro aŭ pli – aŭ malpli!? Eĉ malnovaj fontoj povas grave helpi al multaj, ekz-e al historiistoj, verkistoj, eseistoj k.t.p., kiuj alie, tre malfacile – se fakte eble - povus atingi al sia serĉato.

Eblege la plej granda movad-informa fonto estas revuo Esperanto; certe se UEA metu ĝiajn pasintajn n-rojn sur la interreto,

Dum en multaj evoluintaj landoj, oni povas unu-monate perlabori sufiĉe por aĉeti novan aŭtomobilon, en tre multaj evoluantaj landoj la monata salajro de plejmulto ne sufiĉas por aĉeti la Novan PIVon aŭ eĉ tre malpli karajn librojn!

eĉ kune kun bona tekst-serĉilo por ili, tio kaj kaŭzos altan ondon de kreado de novaj analizoj kaj eseoj kiuj vigligus la movadon, kaj estos inda ekz-o por aliaj fari la samon. Ja, ĉiam troviĝas tute pagivaj homoj – ĉu en evoluintaj ĉu en evoluantaj landoj - kiuj volonte pagus por tiaj servoj kaj eĉ donacus ekstran sumon por subteni tiajn agadojn.★

Eta ŝanĝo strategie, se bone kalkulita, povas kaŭzi egan efikon nekalkuleblan sur la progresritmon de la movado - nun interreto disponigas al ni bonan okazon ĉi-rilate.


Angla-Esperanta-Hungara etVortaro pri Lingvo kaj Komunikado Aperis

Ilona Koutny: Angla-Esperanta-Hungara etVortaro pri Lingvo kaj Komunikado. Kun ekzercoj. Poznan: ProDruk. 126 p. B6 formato. 9,90 eŭro. La libron eblas mendi ĉe UEA, FEL kaj ĉe la aŭtoro. La ĉapitro pri "lingvoj kaj lingvistiko" disponigas la bazajn nociojn rilatajn al lingvoj, gramatiko kaj diversaj terenoj de lingvistiko, kiujn oni bezonas, se oni lernas kaj interesiĝas pri lingvoj. La listo de ĉ.250 lingvoj estas nur elekto el la pli vaste uzataj kaj konataj. En la dua ĉapitro pri "komunikado praktike" kolektiĝis parolturnoj de la ĉiutaga komunikado, kiu abundas je frazeologiaĵoj kaj tre varias de lando al lando, sed en Esperanto nur malmultaj fiksiĝis. Esperanto funkcias kiel interkultura komparilo inter la du etnaj lingvoj.

La Angla-Esperanta-Hungara laŭtema etvortaro plene trafas vian celon, se vi volas lerni lingvon (ĉefe en progresa nivelo) kaj ekzameniĝi, aŭ se vi volas paroli kaj skribi pri iu temo kun riĉa vortprovizo. La ĉ. 1200 vortoj kaj esprimoj en la unuopaj temoj estas ordigitaj sub ofte-uzataj kapvortoj laŭ la praktikaj bezonoj de lingvouzo. Ilia speciala lingva bildo de la mondo vokas al plua migrado. Fine, kelkaj leksikaj kaj komunikaj ekzercoj helpas la prilaboron de la temoj.

Dua en la serio de CELTRAFO, laŭtemaj etvortaroj estas: Lingvo kaj Komunikado. La unua volumo: Lernado kaj laboro aperis en 2002, ĝi ankoraŭ mendeblas. D-ino Ilona Koutny, estas membro de AdE kaj gvidanto de Interlingvistikaj Studoj, Universitato Adam Mickiewicz Miedzychodzka 5, PL-60-371 Poznan,T: +48-61 829-27-09, Sekretariejo: 829-27-01, Fakso: +48-61 829-27-00 (sekretariejo)

تعدادی محدودی از این کتاب در دفتر مجله با تخفیف ویژه موجود است!



Floroj el "La Florejo" de Sadio

Ŝejĥ Moslehoddin Sadio Ŝirazi rekonita kiel Sadio, estas unu el la plej famaj iranaj antikvaj poetoj kiu vivis antaŭ 800 jaroj en Ŝirazo. Oni konas lin kiel la majstron de persaj prozo kaj poemo. Li havas fortan influon sur la persan literaturon.

"Golestan" (la persa vorto por florejo) estas lia plej fama libro kiu plenas je rakontoj kaj admonoj. En ĉi tiu nova rubriko, estos prezentataj al vi fragmentoj el tiu libro tradukitaj al Esperanto.




Portreto de Sadio (1184-1218)

Rakonto

La mosko estas tio kio mem odoras; ne tio pri kio parfumisto oratoras. La saĝulo similas al parfum-botelo, silenta kaj arto-hava; sed la malsaĝulo similas al milita tamburo, malsilenta kaj kava.

Saĝulon inter malsaĝuloj
Ĝuste similigis pensuloj
Al belulino inter blinduloj
Korano hejme de sendiuloj

Tradukis: d-ro Kejhan Sajjadpur



Rakonto

Foje vojaĝis mastro kun sia sklavo per ŝipo. La sklavo neniam estis vidinta ŝipojn. Tial li maltrankviliĝis kaj tedis la popolon, kiu vojaĝis kune. Li senĉese paŝadis en la ŝipo ĝemante. En la ŝipo sidante saĝulo sia-geste diris ĵetu la sklavon en la maron!

La sklavo ne scipovis naĝi. Estis tre malbona situacio. Li klopodis atingi la ŝipon, sed vane. Li anhelis kaj ekkriis: Helpu, savu min! La sklavo preskaŭ estis droninta, la saĝulo gestis:"*Savu lin*!"

Poste la sklavo sidis en la ŝipo trankvile sen tedo. Oni demandis la saĝulon, pri la kialo. La saĝulo respondis ridete: *Estis necese ĵeti lin en la maron por ke li sciu la valoron de la ŝipo.*

Tradukis:
d-ro H. Raŝidi,Torbat-e Ĝamo (Irano/Afganio)

Geedziĝo aŭ fuĝo

Verkita de (d-ino) Ŝirin Ahmad-Nia

Tio tiel strange sonis al li. Li demandis ŝin:
-*Tiel rapide geedziĝi*?
Ŝi jam estis dirinta al li:
Mi trovas vin sufiĉe bona! Pri viaj boneco kaj meritoj, mi ne dubas. Do, kial ne agi rilate al la svatado de mi. Venu por paroli kun miaj gepatroj. Kial perdi la tempon! Ĉu vi dubas pri mia amo al vi?

Kaj li miris. Ili nur ĉirkaŭ du-monatojn konis unu la alian. Ja, ŝi estis sufiĉe bela, tia kaj tia. Li serioze pensis pri sia rilato kun ŝi. Li kompreneble dezirus havigi al si edzinon kiel ŝin, tamen por atingi al tiu grava decido, tio estas, geedziĝo, li ankoraŭ bezonis pli da tempo. Li pensis: -'Se temus pri aĉetado de aŭtomobilo, aŭ domo, mi ne tiom hezitus. Sed, temas pri dum-viva kunulino, kaj estonta patrino de miaj gefiloj. Neniel decas hasti. Ni devas pasigi pli da tempo unu kun la alia kaj sperti nian kunestadon dum diversaj okazoj. Ni devas en trankvileco interparoli pri niaj pensmanieroj, idealoj, ŝatataĵoj kaj malŝatataĵoj. Mi kredas ke reala vivo multe foras de la revaj bildoj, kiujn ofte la gejunuloj antaŭ la geedziĝo bildigas al si. Necesus almenaŭ iom pli klarvide antaŭenpaŝi. Alie, geedziĝo baziĝus sur nura ŝanco!



Li estis embarasita. Lia ŝi-o ne povis atendi, aŭ ne volis. Ŝi kiel tradicie edukita irana junulino supozis: - *"Ne estas dece longtempe vidiĝi kun junulo, sen baldaŭa fianĉiniĝo, aŭ edziniĝo al li. Oni pri-klaĉos pri mi. Eble post multaj monatoj de amikeco, li plu ne amos kaj forlasos min. Tiam li estante viro, facile povos komenci novan rilaton kun alia fraŭlino, sed pri mi temos pri perdo de bona edzo, kaj ankaŭ fifamiĝo. Oni dirus, ĉiu-tage ŝi trovas novan amikon!"* Do, ŝi diris al li:
- *Nia rilato ne povas longe daŭri ĉi tiel. Vi devas rapide decidi. Aŭ vi amas min kaj ekagos rilate al nia geedziĝo, aŭ plu vi ne vidos min.*

Li estis irana junulo, kiu pasigis multajn jarojn eksterlande en okcidenta lando. Eble se li ne jam vivis tiom da jaroj ekster-irane, tiuj paroloj de lia amatino tute ne ŝajnus strangaj al li. Nu, efektive la pli-multo de la junuloj lialande sam-tiel geedziĝas, tre frue kaj ofte kun nur surfaca reciproka kono. Tio estas normala tiulande. Sed li spertis alimanieran konduton de gejunuloj en alia lando. Tie ili povis tute libere kaj tre intime geamikiĝi. Pasigi longan tempon kune sen interveno de la gepatroj, kaj esti tute indiferentaj pri la pensmaniero de la ĉirkaŭuloj. Ili povis kunvivadi eĉ sen geedziĝo, sed en lia lando, ĝenerale, eĉ simpla amika rilato de gejunuloj devus esti kontrolata kaj prizorgata de gepatroj kaj okaze de malpermsoj, la rilato okazus nur kaŝe kaj sekrete kun multaj problemoj. Tie do la gejunula kontakto ofte kondukiĝis al geedziĝo, alie la bona reputacio de la fraŭlino kaj tiu de ŝia familio endanĝeriĝus. Jen, kion li povus fari? Ĉu cedi al la trudaj kondiĉoj sia-landaj, tio estas, preskaŭ blinde decidi pri sia futuro esperante ke li bonŝancos rilate al ŝi, aŭ tute forlasi la ideon kaj turniĝi al la lando, kie pensmaniero de popolo pli harmonias al la lia? ★

Nobela Pac-premio por Irana Virino

Ŝirin Ebadi, la Unua Islamanino Gajninta Nobel-PacPremion en la Mondo

Jen la traduko de deklaracio de Nobel-komitato citita el la oficiala TTT-ejo (en la norvega kaj angla): http://www.nobel.se/peace/laureates/2003/press.html
La traduko aperis: http://donh.best.vwh.net/Esperanto/nobel_2003.html

NOBEL-KOMITATO

La Nobela Pac-premio 2003



Ŝirin Ebadi

La norvega Nobel-komitato decidis aljuĝi La Nobelan Pacpremion por 2003 al Ŝirin Ebadi pro ŝiaj klopodoj por demokratio kaj homaj rajtoj. Ŝi fokusis precipe sur la batalon por la rajtoj de virinoj kaj infanoj.

Kiel advokato, juĝisto, lekciisto, verkisto kaj aktivulo, ŝi eldiris sian parolon klare kaj forte en sia lando, Irano, kaj multe pli foren trans ĝiajn landlimojn. Ŝi stariĝis kiel adekvata profesiulo, kuraĝa persono, kaj neniam priatentis la minacojn kontrau sia sekureco.

Ŝia ĉefa areno estas la luktado por bazaj homaj rajtoj, kaj tio ke neniu socio meritas esti nomita civilizita krom se la rajtoj de virinoj kaj infanoj estas respektataj tie. En epoko de perforto, ŝi konstante subtenis senperforton. Estas fundamenta al ŝi la opinio ke la supera politika potenco en komunumo devas baziĝi sur demokratiaj elektadoj. Ŝi preferas informadon kaj dialogon kiel la plej bonajn vojojn por ŝanĝi sintenojn kaj solvi konflikton.

Ebadi estas konscia Islamano. Ŝi vidas ne konflikton inter Islamo kaj fundamentaj homaj rajtoj. Laŭ ŝi tio estas grava ke la dialogo inter la diversaj kulturoj kaj religioj de la mondo davas preni al si kiel deirpunkton, siajn komunajn valorojn. Estas plezuro por la Norvega Nobel-Komitato aljuĝi la Pac-Premion al virino kiu estas parto de la islama mondo, kio povas esti fiera pri ŝi - kune kun ĉiuj kiuj batalas por homaj rajtoj kie ajn ili vivas.

Dum la lastaj jardekoj, demokratio kaj homaj rajtoj antaŭeniris en diversaj mondopartoj. Per siaj dis-aljuĝoj de la Nobela Pacpremio, la Norvega Nobel-Komitato provis rapidigi tiun ĉi procedon.

Ni esperas ke la irana popolo ĝojiĝos pro tio, ke por la unua fojo en la historio unu el iliaj civitanoj estas aljuĝita la Nobelan PacPremion, kaj ni esperas ke la Premio estos inspirado por ĉiuj kiuj batalas por homaj rajtoj kaj demokratio en ŝia lando, en la islama mondo, kaj en ĉiuj landoj kie la batalo por homaj rajtoj bezonas inspiradon kaj subtenon.

Oslo, la 10an de Oktobro 2003.



Foto: Ĵurnalo "Ŝarg" 11 10 2003

Ŝirin Ebadi, la Unua Nobel-PacPremiito el Irano

Jen Esperanta traduko de partoj de biografio de Ŝirin Ebadi, la gajnintino de ĉijara Nobel-Pacpremio, laŭ la TTTejo de Nobelo, en la norvega kaj angla (alirebla sur: http://www.nobel.se/peace/laureates/2003/ebadi-bio.html):

LA NORVEGA NOBEL-KOMITATO

Biografio

ŜIRIN EBADI

Ŝirin Ebadi, La Irana advokato kaj aktivulo por homaj rajtoj, naskiĝis en 1947. Ŝi ricevis licencion pri juro de la Universitato de Tehrano. Dum la jaroj 1975-79 ŝi servis kiel prezidento de la urba tribunalo de Tehrano, estante unu el la unuaj juĝistinoj en Irano. Post la revolucio en 1979 ŝi estis devigita eksiĝi. Ŝi nun laboras kiel advokato kaj ankaŭ instruas ĉe la Universitato de Tehrano.

Kaj en siaj esploroj kaj kiel aktivulo, ŝi estas konata pro antaŭenigo de pacaj, demokratiaj solvoj al gravaj problemoj en socio. Ŝi aktive partoprenas en publikaj debatoj kaj estas konata kaj admirata per la ĝenerala publiko en sia lando por la defendado antaŭ la tribunalo por viktimoj de atako de la konservativa frakcio kontraŭ libera parolado kaj politika libereco.

Ebadi reprezentas Reformitan Islamon, kaj argumentas por nova interpretado de islama juro kio estas harmonia kun bazaj homaj rajtoj kiel demokratio, egaleco antaŭ la leĝo, religia libereco kaj libera parolado.

Ebadi estas aktivulo por rifuĝintaj rajtoj, kune kun tiuj de virinoj kaj infanoj. Ŝi estas la fondinto kaj gvidanto de la Asocio por Subtenado de la Infanaj Rajtoj en Irano. Ebadi verkis kelkajn akademiajn librojn kaj artikolojn fokusintaj sur homaj rajtoj. Inter ŝiaj libroj kiuj tradukiĝis anglalingven estas La Rajtoj de la Infano, Esploro de Juraj Aspektoj de Infanaj Rajtoj en Irano (Teherano, 1994), eldonita kun subteno de UNICEF, kaj Historio kaj Dokumentaro de Homaj Rajtoj en Irano (NovJorko, 2000).

Kiel advokato, ŝi envolviĝis pri kelkaj disputigaj politikaj kazoj. Ŝi estis la advokato de la familioj de la verkistoj kaj intelektuloj kiuj estis viktimoj de la seriaj murdoj en 1999-2000. Ŝi laboris aktive - kaj sukcese – por malkaŝi la ĉefulojn malantaŭ la atako kontraŭ la studentoj ĉe Universitato de Tehrano en 1999 kie kelkaj studentoj mortiĝis. Rezulte, Ebadi estis malliberigita en multaj okazoj.

Kun Islamo kiel sia deirpunkto, Ebadi kampanjas por pacaj solvoj al sociaj problemoj, kaj antaŭenigas novan pensmanieron pri islamaj terminoj. Ŝi montris grandan personan kuraĝon kiel advokato defendanta individuojn kaj grupojn kiuj fariĝis viktimoj de potenca politika kaj jura sistemo kio estas leĝigita tra nehumana interpretado de Islamo. Ebadi montris sian volon kaj kapablon kunlabori kun reprezentantoj de kaj sekularaj kaj religiaj opinioj. *Oslo, 10 Oktobro 2003*

La Lasta Vorto: Ŝirin Ebadi

Demokratio kaj Islamo

Far: Marie Valla

Numero de 11-a de Okt. Ĝis la lasta semajno, Nobel-Pacpremia laŭreato Ŝirin Ebadi, 56-jaraĝa, estis apenaŭ konata figuro ekster sia patrio. Sed en Irano, Ebadi fariĝis fame konata kiel senlaca defendanto de malfortuloj, kaj simbolo de paca rezistado. Ŝi estis juĝisto ĝis la 1979-a revolucio, kiam ĝi ekskluzivis virinojn el la juĝistaro kaj ŝi ekreprezentis nombron da alt-profilaj reĝimkritikuloj, dediĉanta sian vivo al la simpla ideo, ke Islamo kaj homaj rajtoj ne estas neakordigeblaj. Fine, tamen, Ebadi-a laboro ankaŭ alterigis ŝin trans la leĝon. En 2000 la eksjuĝistino estis arestita kaj akuzita pro disdonado de surbendigita konfeso de privatmilicano envolvita pri perforto kontraŭ reformistoj. La tribunalo kondamnis ŝin al 15 monatoj en prizono kaj malpermesis ŝin praktiki juron por kvin jaroj. Fine, ŝia kondamniĝo nuligiĝis. Lastan semajnon la kampanjanta advokato fariĝis monde fama, kaj eĉ gvidantoj de irana registaro estis devigitaj eldiri malvarmetajn publikajn gratulojn. Ebadi estis survoje al la pariza flughaveno por kapti aviadilon reen al Tehrano kiam ŝi aŭdis de la radio ke ŝi gajnis la Pac-premion de Nobelo. Ebadi, kiu estis en Francio por parola batalo, estis ŝokita kiel ĉiuj. La sekvantan matenon ŝi sidis kun NEWSWEEK-a Marie Valla priparoli la situacion en Irano kaj kiel la premio povus helpi al ĝia ŝanĝado. Jen eltiraĵoj:

VALLA: Ĉu ĉi tio estas turnopunkto por demokratio en Irano?

EBADI: Mi esperas jes. Mi ĉiam agadis kadre de la leĝo; mi neniam faris ion kio estis kontraŭleĝa. Mi subtenas pacajn protestojn. Sed kiam aferoj problemiĝas mi estas tie por defendi la viktimojn, senpage. En 1999 kiam la studento-dormejoj estis atakitaj, mi defendis unu familion de viktimoj antaŭ la tribunalo kaj tio gvidis min en prizonon. Do mi esperas, ke ĉi tiu premio donos al subtenantoj de homaj rajtoj en Irano la kuraĝon kaj la energion por daŭrigi. Efektive, la plej granda profito de tiu ĉi premio estas tio ke montras ankoraŭ tio estas ebla ke oni restu en Irano kaj laboru por la antaŭenigado de la homaj rajtoj tie.

Ĉu vi pensas ke la reĝimo en Irano povas reformi sin aŭ ĝi estas senmoviĝinta en senespera senelirejo inter la reformistoj kaj la malnova gardo?

Mi kredas ke ankoraŭ eblas ke oni alportu reformon al la reĝimo, sed nun estas la tempo por ekago kaj ankaŭ pragmata penso. Eĉ en Irano, kie ne estis iu grava reformo, la nombro de homoj kiuj subtenas reformon pliiĝis. Tio donas al mi esperon ke ĝi fine iam okazos.

Vi dum longa tempo argumentis ke homaj rajtoj povas ekzisti en islama respubliko. Kiel vi povas klarigi la nunan situacion en islamaj landoj tutmonde?

Ne estas kontraŭdiro inter islama respubliko, Islamo kaj homaj rajtoj. Se en multaj islamaj landoj homaj rajtoj estas malobeataj, ties kaŭzo estas malĝusta interpretado de Islamo. Ĉion kion mi provis fari en la lastaj 20 jaroj estis por pruvi tion, ke per alia interpretado de Islamo estus eble enkonduki demokration al islamaj landoj. Ni bezonas interpretadon de Islamo, kiu lasas multe pli da spaco por virinoj ekagi. Ni bezonas Islamon kiu estas kongrua kun demokratio kaj respektemas la individuajn rajtojn.

Vi ne kovris vian kapon per la heĝabo , aŭ vualo, ĉe la gazetara konferenco. Ĉu vi volis eldiri ion tiel?

Ene de Irano, virinoj estas postulitaj per leĝo surmeti la heĝabon do mi surmetas ĝin tie. Sed kiel mi menciis, mi kredas tion, ke per pli progresema interpretado de Islamo ni povas ŝanĝi tion ĉi. Mi kredas ke tio dependas de individuaj virinoj decidi ĉu ili volas surmeti la heĝabon , aŭ ne.

Kion vi pensas ke okazos kiam vi reiros al Irano? Ĉu vi estas angora pri via sekureco kaj via estonto?

Ĉio okazis tiel rapide ke mi vere eĉ ne havis tempon por pripensi ĝin. Mi neniom timas kaj mi ne gravigas tiel multe pri tio ke kio okazos al mi. Mi reiros al Irano ĉar mi estas iranano kaj mi deziras morti en mia lando. Mi diru ion al vi: imagu ke vi estas hejme kaj via patrino estas malsana maljunulino, dum via najbaro ĵus apud via domo havas pli junan kaj pli viglan patrinon. Ankoraŭ, vi restos kun via malsana maljuna patrino ĉar ŝi estas via patrino. Kiam mi estas en Parizo, kie dank' al la Franca Revolucio homoj havas ĉiujn rajtojn, kompreneble mi ĝuas tion kaj mi estas gaja. Sed ĝi ne estas mia hejmo.

Kio estas via espero por la estonteco de Irano?

Mi esperas, ke junaj irananoj povas iri pluen ol mi. Mia generacio havis nemultajn rimedojn por teni sin informitaj. Kiam mi estis juna ni havis nek komputilojn nek la Interreton. Nia nura fonto de informoj estis malgranda biblioteko de la universitato. Do mi esperas, ke hodiaŭaj gejunuloj povas agadi multe pli kaj fari multe pli bone por nia lando ol mi.

Esperantistaj Mesaĝoj al Ebadi

Jen parto de mesaĝoj kiujn ni ricevis de eksterlandaj gesamideanoj al/pri Ŝirin Ebadi. Dankon al ili, gratulon al ŝi !

Estimata sinjorino Shirin Ebadi,

Mi kredas, ke en ĉi tiuj tagoj vi ricevas tiom da mesaĝoj, ke vi ne povas atenti ĉiujn kaj ĉefe ne tiujn en strangaj lingvoj.

Ĉi tiu mesaĝo en la internacia lingvo Esperanto celas nur gratuli vin okaze de la transdono al vi de la premio Nobel pri paco. Bonvolu konsideri, ke parolantoj de la internacia lingvo daŭre havas la celon krei kondiĉojn por pacaj interrilatoj inter la popoloj, kaj por certigi al parolantoj de ĉiu lingvo, granda kaj malgranda, la respekton de la lingvaj homaj rajtoj.

En tiu senco ni tute komprenas viajn klopodojn. Bonvolu akcepti plej sincerajn bondezirojn.

Renato Corsetti
Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

Estimataj gesamideanoj,

Brazila Esperanto-Ligo esprimas gratulon pro la bela venko de la monda paco, rilate al Paca Nobelpremio gajnita de SHIRIN EBADI.

Certe, tiu ekzemplo elmontras al ĉiuj mondcivitanoj, kiuj vere amas la pacon kaj respektas la homrajtojn, ke estas ĉiam eble plibonigi nian planedon !

Elkore kaj varme salutas vin,

D-ro Lucio de Almeida Castro
BEL-Prezidanto (Brazilo)

Karaj gesamideanoj!

El Kostariko, mi esprimas mian ĝojon pro tio ke la Nobel-Akademio elektis Shirin Ebadi-on por la ĉi-jara premio. Kiel esperantisto kaj mondcivitano ĉio, kio okazas en Irano interesas min, precipe pri aferoj koncernantaj homajn rajtojn. La rajton de la irana popolo difini siajn vivmanierojn, sen ekstera enmiksiĝo, kaj la rajton de siaj virinoj esti konsiderataj plenaj homoj, mi subtenas.

Miajn bondezirojn por la irana popolo ankaŭ!

Hugo Mora tikoguau@yahoo.com (Kostariko)

Elkorajn gratulojn kaj dankojn al sinjorino Shirin EBADI. Ŝia persistemo redonis kuraĝon al ĉiuj kiuj batalas por justa celo.

Hélène FALK
Esperantista Brusela Grupo (Belgio)

Kun grandega ĝojo aŭdis ni, mia edzino kaj mi, pere de televido, pri Ŝirin Ebadi, al kiu ĵus estis atribuita la mondfama pacpremio Nobel.

Ĉar ni ja scias, kiel aktiva ŝi estas por la homrajtoj en Irano, kaj aparte por la rajtoj de la virinoj kaj de la infanoj, ni petas vin tutkore gratuli al ŝi tutsincere. Dank' al agadoj kiel la ŝiaj, la socia ekvilibro de la mondo fariĝas pli kaj pli atingebla kaj reala: tial, ni dankas multe al ŝi, esprimante al ŝi nian simpation !

Hervé Mougin herve.mougin1@libertysurf.fr (Francio)

Mi franca esperantistino,estas feliĉa ke virino gajnis Nobelan Premion. Tio pruvas egalecon de la du seksoj kiun certaj gentoj forpuŝas.Gratulojn, dankon nome de ĉiuj virinoj kiuj batalas por virinaj rajtoj, al tiu sinjorino.

Jocelyne Monneret (emerita instruistino), St Rémy (Francio)

Estimataj,

Nome de nia loka klubo Charente Esperanto, kaj de nia regiona asocio Esperanto Poitou-Charentes (Francio), ni varme gratulas la premiiton de la Nobel-premio pri paco Ŝirin Ebadi, kaj ni esperas, ke tiu premio estos favora al ĉiuj irananoj kaj al ĉiuj pac-batalantoj.

Kore, Marie-France Conde Rey, (Francio)

Estimataj Iranaj samideanoj

Mi gratulas al vi pro la aktivisto Ŝirin Ebadi, kiu la pacpremion Nobel estas ĵus atribuita.

En japanio ni ne povas havi informon multe pri soçiala situacio de Irano.

Ĉar kiel vi scias, novaĵ-agentejoj de mondo estas monopolita de okcidentaj eŭropaj kaj usonaj kompanioj. Ili elektas la novaĵojn, kaj plie japana novaĵ-agentejo elektas de ili. Tiamaniere, kiam la novaĵoj atingas antaŭ ni, ili estis elektitaj laŭ vidpunkto de partaj homoj. Se via asocio publikigus specialan tekston en esperanto pri ĉi tiu aktivisto kaj la movado, ni volonte legos ĝin. Mi esperas, ke Esperanto funkcius kiel pontlingvo por popolo.

Amike, Viola M Ando (Kanazawa, Japanio)

Saluton karaj geamikoj!

Pere de la la iranaj Esperanto-asocioj, mi ŝatus korege gratuli s-inon Ŝirin Ebadi! Eĉ en la malproksima Belgio, ni aŭdis pri ŝia laboro por plibonigi la situacion de la virinoj kaj la infanoj en via lando. Nome de la Esperanto-grupo "La Konko" el la belga urbo Oostende,

Else HUISSEUNE, Prezidantino, (Belgio)

Saluton

Mi ĵus scias ke la Nobel-premio pri Paco de 2003 iris al irananino kaj tre gratulas al vi!

thekra@zipmail.com.br (Brazilo)

Salutojn al Ges-noj de Irano:

Ke la Paco-Nobel premiitino ŜIRIN EBADI estu nova okazo por ni ĉiuj senĉese labori por la homaj rajtoj de inoj kaj infanoj en la tuta mondo.

Ro.Sartor (Buenos Aires, Argentino)

Ŝirin Ebadi, al kiu la pacpremio Nobel estas ĵus atribuita, estas muzulmana irananino, kiu aktivas por la homrajtoj en sia lando, kaj aparte de la rajtoj de la virino kaj de la infano.

Tio estas signifa paŝo por ĉiuj virinoj, sen kiuj la socia ekvilibro de la mondo estas neatingebla.

Certe valorus ke ĉiuj esperantistoj, kaj precipe esperantistaj virinoj, pere de siaj iranaj geamikoj kaj konatoj en Irano, aŭ de la iranaj Esperanto-asocioj, esprimu sian simpation kaj dankon al Ŝirin Ebadi pro ŝia laboro, ke ili gratulu ŝin.

esperanto@fibertel.com.ar (Argentino)

Kelkaj aspektoj de vortludoj kaj luda komunikado en Esperanto

Esperanto aŭ edzperanto



Aleksandro S. Melnikov

*La suba artikolo estas bazita sur la baldaŭ aperonta pli ol 200-paĝa libro "**Vortludoj kaj luda komunikado en Esperanto: lingvaj premisoj, tipoj, specifeco kaj antologieto**" de Aleksandro S. Melnikov. Ni kore dankas lin pro la kontribuaĵo al nia revuo.* ***La Red.***

Nia artikolo estas dediĉita al tio, kion Sigmund Freud (1856-1939) nomis la plej multnombra kaj 'ĉipa' spritaĵ-grupo sed la aŭtoro de duonmilpaĝa studego pri ĉi-temo, V. Sannikov, epitetis alie: 'kaj bonega instruisto pri belvortumado, kaj amuza kunparolanto, kaj granda konsolisto-psikoterapeŭto' (1) [Sannikov-1: 26-27, 514] – al **vortludo (2)** kaj **luda komunikado (3)** (LK) aŭ **lingva ludo** (LL) ĝenerale.

Laŭ Freud, lingva ŝerco kontentigas interalie homan agresemon kaj obscenemon, kutime subprematajn de kulturo (4). La funkcio de la ludaĵo estas ĉi-kaze maski la obscenaĵon je io deca por superi la cenzuron de kulturo. LL 'dolĉumas' ankaŭ didaktikemon kaj moralemon: io instrueca kaj delonge konata dank'al LL ekhavas tute freŝan aspekton kaj per tio pli fortan efikon, iam eĉ filozofian sentencecon. Ĝi kamuflas kaj mildigas malĝentilecon kaj vulgarecon (ekzemple, en ironio). Eĉ ŝajne absurda spritaĵo ludas sian rolon. Laŭ Freud, ĝi estas 'siaspeca ribelo kontraŭ la tiraneco de la menso. Ni konsideru, cetere, ke en ĉiuj sferoj de sia vivo homo strebas ian ordecon (do, malliberecon) kaj samtempe liberecon. Kiel ekzemplo de la lasta povus esti menciitaj diversspecaj preskaŭ senbridaj karnavaloj, festoj ks., kie oni rajtas neglekti kutimajn normojn kaj malpermesojn. Io simila validas pri LL – ĝi estas siaspeca lingva karnavalo, sekve, 'velura ribelo' (ĉar sensanga, milda) kontraŭ la potenco kaj postuloj de Lingvo (5). Krome, kaj ŝerco-produktanto kaj -konsumanto ĝuas ne nur la ribelon, sed ankaŭ sian kreivon/komprenivon – do, sian intelektan bonstatecon kaj, iam eble, superecon al la protagonistoj de lingvaj ŝercoj [kp. Sannikov-1: 27, 29, 30].

Ofte oni konsideras Esperanton malsupera al etnaj/naciaj lingvoj. Ankaŭ sfere de vortludoj. Tial ĉi-studete ni traktu nur unu aspekton de tiu vasta fenomeno. Ni analizu **tipojn de distingoj** inter la vortoj aplikataj por vortludoj kaj ŝercoj en la rusa kompare kun Esperanto.

En ruslingvaj VL-j oni ofte koliziigas por estigi humuran efekton:

Rektan kaj **figuran** sencojn de vortoj. La samo ekzistas en Eo: – *Panjo, ĉu estas vere, ke la anĝeloj havas flugilojn? – Jes. – Ili do povas flugi. – Certe. – Ĉu ankaŭ nia servistino povas flugi? – Kial tia demando? – Hieraŭ paĉjo kisis ŝin kaj nomis ŝin 'anĝelo mia'. – Ŝi forflugos morgaŭ matene* (koliziigo de la rekta senco 'flugi' kaj figura – 'rapide for-moviĝi') [Kruko: 110]; – *Ĉu vi diros al mi, kiu estas la vojo al la malliberejo? – Volonte. Ĉu vi vidas jen unu sinjoron! Nu, forprenu de li la poŝhorloĝon kaj oni kondukos vin en la malliberejon* [la du sencoj de 'vojo': rekta – 'plej taŭga irejo, uzata inter du lokoj' kaj figura – 'agmaniero, rimedo, por aliri al io celata'] [Ossaka: 11].

Propranoman kaj **ĝeneralan vortojn.** La samo ekzistas ankaŭ en Eo: *Jes, mi komprenas: Tage* (antaŭnomo de reala homo – A.M.) *Erlander estas la ĉefministro de Svedujo... Tage* (en la hela tempo de diurno – A.M.) *li estas Erlander. Sed kiu li estas nokte?* [koko krias: 146/147]; *Iam li komprenis ke en informado ne helpas Lapenna sed la peno* [Esp-Aktuell: 1998, 6, 21]; [pri Boulton, vicestro de instruista seminario en Hexham] *Talent' penetra, riĉa, formodresa / Eks-amon sondas ne per Hexhametro* ('hibrido' de *heksametro* kaj *Hexham* – A.M.) [LNLR 1961, 33, 96].

Terminecan kaj **ĝeneraluzan signifon de vortoj**: – *Rakontu al mi ion pri la familio* (termino – A.M.) *de la orkideoj. – Pardonu, fraŭlino, sed mia patrino ne permesas al mi klaĉi pri aliaj familioj* (ĝeneraluza signifo –

A.M.) [Step: 103]; *Ne supozu… ke deksepjaraj koleginoj ekde ĉi tiam anstataŭ pri virina modo* (ĝeneraluza signifo – A.M.) *babilos ekskluzive nur pri gramatikaj modoj* (termino – A.M.) [Piĉ: 30]; *La publiko direktis sian aplaŭdon ne tiom al la aspektoj* (termino – A.M.) *de la verboj, kiom al la aspektoj* (ĝeneraluza signifo – A.M.) *de la oratoroj* [La Praktiko: 1960, 9, 127]; *La instruisto instruas lecionon pri verbaj tempoj kaj sin turnas al lernanto, kiu sidas sur la lasta benko kaj diras: – Mi tusas, vi tusas, li tusas, ŝi tusas. En kiu tempo* (termino – A.M.) *estas tio? – Vintra tempo*(ĝeneraluza signifo– A.M.), *kamarado instruisto! – aŭdiĝas tuj la voĉo de la neatentema lernanto* [Infana mondo, 1983/84, 1, 4].

Liberan vorton kaj vorton – **parton de frazeologiaĵo.** Similaĵo ne mankas en Esperanto: *tiuj, kiuj ... petas la manon de via edzino / ĝentile ĝis kongresfino / (ĉe kio estus amuze vidi ilian vizaĝon, / se fakte ili ricevus nur la manon!)* (koliziigo de la signifoj: frazeologia 'edziĝproponi' kaj libera vortkuno 'peti manon', kiu estus tute analoga al 'peti kruron, okulon….')

Ĝeneraluzan kaj individuan/neologisman/porokazan vorton; temas kaj pri la formo kaj pri la **signifo.** Tio troveblas ankaŭ en Esperanto: *D-ro Kalocsay uzis tro densan lingvon kaj plej ofte nur nudajn radikojn sen la necesaj afiksoj. Ĉu tiu nudismo* (la signifo de tiu vorto en ĉi-ŝerco ne egalas al la ĝenerale akceptita – A.M.) *tiel ŝokas vian prudenton, Brenda?* [LNLR: 1960, 31, 23]. Pluraj 'hibridoj' cititaj ĉi tie apartenas al porokazaj vortoj kun individuaj kaj formo kaj signifo.

Dialektan/ĵargonan kaj **literaturan vortojn**. Kvankam en Esperanto ne ekzistas dialektoj en la klasika senco de l'vorto, tie ja enestas interferolektoj, t.e. specifaj formoj de Esperanto, kondiĉitaj de la influo flanke de la gepatra (ĉefa, domina) lingvo. La menciita fenomeno estas uzata por krei t.n. **dialektumojn/krokodilumojn**: specon de LK, en kiu estas uzataj paronimoj plene kompreneblaj (aŭ asocieblaj) nur al homoj, kiuj posedas la saman nacian lingvon aŭ dialekton, ĵargonon ks. Foje oni kombinas esperantajn kaj naciajn morfemojn/kvazaŭmorfemojn en unu hibrida vorto. Foje V. Samodaj diris pri malamiko de Esperanto (kaj samtempe la 'direktoro de la sovetiaj esperantistoj', t.e. la sola homo, al kiu la ŝtato pagis salajron por ke li 'kontrolu kaj reguligu' la E-movadon en Sovetio!) A. Berjoza: *Kaj tiel tjfu* (hibrido de la Ea '*kaj tiel plu*' kun la rusa 'тьфу (*tjfu*)', kio signifas '*kraĉ*'). En sovetian junularan E-aranĝon SEJT alveturis esperantisto, kiu preterlasis la unuajn tagojn de la tendaro kaj ankoraŭ ne sciis realaĵajn kaj lingvajn specifaĵojn de la aktuala SEJTo. Alia SEJTano, kiu tiam estis forveturonta, diris al la ĵusveninto: '*Mi povas donaci al vi miajn pantalonojn.*' – '*Dankon, sed mi ne bezonas.*' – '*Prenu. Tutegale ili estas por mi superfluaj, ĉar mi ja hodiaŭ forveturos*'. - '*Kial do vi ne kunprenus ilin kaj uzus aliloke*'. - '*Sed ili ne uzeblas aliloke*' ktp. Evidentiĝis, ke en tiu SEJTo la manĝado eblis laŭ specialaj kuponoj, kiuj ricevis ŝercan nomon '*pan-talonoj*' el la rusa'талон' *('talon'')*(6), kio signifas kuponon. *Firmiĝu, homoj - baldaŭ LETO!* [retmesaĝo de A. Ananjin-Grigorjevskij]. Priluditaj: la rusa '*лето* (leto)', kiu ekvivalentas al la E-a '*somero*' kaj la E-a siglo '*LETO*' el 'Libera Esperanto-Tendaro'.

Do, ni vidas, ke **ne ekzistas** premisoj por luda komunikado, **kiuj** ĉeestas en la rusa lingvo sed **ne eblas** en Esperanto.

Iom pri luda komunikado bazita sur paronimio

Paronimio estas lingva fenomeno, kiu konsistas en tio, ke ekzistas vortoj, kiuj tre similas forme, sed malsimilas enhave (ekzemple: balo – bolo). Tiajn vortojn oni nomas paronimoj. Ili estas oftege uzataj en esperantlingvaj vortludoj kaj LK ĝenerale.

Vortkvanta konsisto de la priludataj paronimoj

En nia materialo troveblas paronimoj, kies unuoj estas klasifikeblaj jene.

1. Unu aparta vorto – alia(j) aparta(j) vorto(j).

Ekzemploj: *Kion vi ĉi tie faras? – Mi menuas kaj enuas* [V. Aroloviĉ, reala konversacio en restoracio]; [Okaze de sia postreferenduma eksiĝo ŝtatestro diris] *La fidelec-atesto aŭ pli vere, la fideleca testo de mia popolo ĝiskore… duŝis min* (ne esprimita sed atendita paronimo: *tuŝis*) [KS: 192]; [Okaze de studentaj ribeloj en Francio 1968] *Tiam la studentoj, edukataj en unirenversitatoj, deziris renversi ĉion, se ne tuj katedralojn, do almenaŭ ... katedrulojn* [KS: 187].

Ankaŭ en la rusa abundas tiaspecaj vortludoj: *миф о 'железном занавесе' сдать 'в истерический архив'*; traduke al Eo: *la miton pri 'fera kurteno' – fordoni al la 'histeria arkivo'* (engaĝitaj paronimoj: *исторический/истерический* respektive *historia/histeria*) [Ŝĉerbina: 55].

2. Unu aparta vorto – pluraj vortoj en grupo.

Ekzemploj: *Proleto, sub la prem' de malegalo / Kaj ofte sub ferbot' en mallegalo, / Ne dolĉo via viv', sed male, galo. / Burĝar' militen drivas, mise regas, / vivas en lukso, dum vi mizeregas* [KV: 209]; [pri eksedziĝo] *Kaj ilia paradizo fariĝis para diso* [KS: 105].

3. Grupo de vortoj – alia(j) grupo(j) de vortoj.

Ekzemploj: [Aludo je Neŭtrala Esperanto-movado] *Neutila Esperanto-movado* [GG: 198, 5, 35]; [invito al Ĉinio] *Al Popola Ĉinio* (bazita sur la fonaj scioj pri la ekzisto de E-lingva gazeto '*El Popola Ĉinio*' kaj ties aspekto) [GG:

1981, 6, 1].

Morfemaj/leksikologiaj trajtoj de la priludataj paronimoj

Laŭ la morfema konsisto unuopaj eroj de vortludoj povas esti kombinitaj jene.

1. Simpla (t.e. unuradika, senafiksa) **vorto – alia simpla vorto.**

Ekzemplo: *Ne jubilea, sed jubila estas la informo, ke la homo ... elektiĝis en la estraron de la Federacio* [ER: 1981, 8, 136].

2. Simpla vorto – derivita vorto.

Ekzemplo: Se*d vane li admonis nin ĝistede, / neeble ja persvadi nin* (= nesvedojn – A.M.) *persvede* [KV: 208].

3. Simpla vorto – kunmetita (plurradika) vorto.

Ekzemploj: *Oni prezentas majonezon ĉirkaŭ la fiŝo. Sed la ekspozicion oni prezentos al ni ĉirkaŭ la majomezo!* [GP: 213]; *Valizohava Niko ... / Ofte vojaĝas de Azio ĝis Afriko. / Amasturismon Nik evitas / de Serv' pasporta li profitas; / Imitu lin mondskale: sekvinda laŭ tek-Niko!* (implicita paronimo: *tekniko*) [JA: 207].

4. Derivita vorto – alia derivita vorto.

Ekzemplo: *Vi pruvis, ke ventaĵoj* (vento estas protagonisto de la citata fabelo – A.M.) *ja ne ĉiam estas vantaĵoj* [VP: 41].

5. Derivita vorto – kunmetita vorto.

Ekzemplo: *Feinkanto* (= fein-kanto – A.M.) *estas dolĉa vorto, elvokanta la tutan ĉarmon de l'poezio. Bedaŭrinde, la sama vorto, en la vir-genro, revokas nin al plej banala prozo* (implicita paronimo: *fek-anto* tra *fe-kanto*).

6. Kunmetita vorto – alia kunmetita vorto.

Ekzemploj: [El ŝercaj anoncoj de "GEJ-gazeto"] *Stelo-kurzoj en 1984 ... ŝtelo-kursoj en 1985* [GG: 1982, 4, 20]; [serio da raportoj far R. Schwartz] *Laŭ mia... ridpunkto* (implicita paronimo: *vidpunkto*) [KS: 99].

Notoj.

1. Kunmetitaj vortoj povas enhavi **afiksojn**, inkludi aŭ ne kunligajn **interradikajn vokalojn**. Ekzemplo: *Provo de raporto pri unu parto de partoprenantoj en la Universala Kongreso de Esperanto en Munkeno* [KS: 33], kie '*part'o-pren'ant'o'j*' enhavas interradikan vokalon kaj '*fein-kanto*' (el la supra ekzemplo), kiu ne havas ĝin.

2. La **radikoj** de la priludataj vortoj povas esti **samaj** (*Li volis esti ridiga, sed estis nur ridinda*. Verdeskaj pensoj de Georgo Handzlik [LodE: 2001, 10, 18]) kaj **malsamaj.** La plejparto en nia esplorita vortludaro apartenis al la malsamaj.

3. En nia materialo estis priludataj samtempe **ĝis ses radikoj**. Ekzemploj: *Mi estas ankoraŭ... tute kokjara!* (paronimo: *dudek-okjara*) [KS: 152].

4. Kiel radika vorto en nia materialo rolis: substantivoj, adjektivoj, adverboj, verboj, interjekcioj, pronomoj, numeraloj, prepozicioj, artikoloj, subjunkcioj kaj eĉ afiksoj. Principe nenio malebligas ĉi-celan uzon de konjunkcioj kaj partikuloj. Do, el la **parolelementa** vidpunkto **vort- kaj radik-karaktero** tute **ne influas eblecon engaĝi ĝin en vortludon**.

5. Kiel ni trovis, povas esti priludata **plena vorto**, ĝia **mallonga formo** aŭ eĉ **siglo**.

Ekzemploj en Eo: ['Rubriktitolo' en parodio je la revuo "Esperanto"] *TEDO-paĝo* (implicita paronimo: *TEJO-paĝo*) [GG, 1981, 5, 35]; enkadre de la sovetia esperantista junulara tendaro SEJT-1976 okazis festo de naskiĝintoj. Dum alportado de la celebratoj la lastaj devis imiti kriadon de la ĵusnaskitoj: "*ŭa ŭa*". Anstataŭe la aŭtoro de ĉi-verko, por demonstri sian UEA-delegitecon, kriis: "*UEA-UEA*", kio elvokis ridon de la partoprenantoj; *Enkonduko de Mag. (ĉu magiisto?) Atilio Orellana Rojas (saluton!)* LKK: 1998, 88 JLP p.23; *Longe mi supozis, ke 'mag.' Signifas, se ne magiisto, almenaŭ magazenestro aŭ io simila. Unu fojon, en Vieno, mi sukcesis saluti junulon, kies vizitkarto anoncis 'mag. ped.' Kiel 'sinjoron magistratan pedelon'! Poste oni informis min, ke la junulo estas 'magistro pri pedagogio*' [KS: 133]; *D.L.T.: DorLoTo informatika.* (paronimoj: '*D.L.T.*' kiel siglo de la projekto '*Distributed Language Translation*' populara Esperantuje en la 1980-90-aj kaj '*DorLoTo*' kiel intence misortografiita '*dorloto*') [Arnau-2: 15].

6. Laŭ sia **leksika kriterio**, la studitaj vortoj apartenis al:

r e g u l a j k a j p o r o k a z a j ĝeneralleksikaj/komunaj nomoj; ekzemplo de la porokaza nomo: *Bis-Bis! ... Ni ne estas en bisejo*! (implicita ĝeneralleksika paronimo: *pisejo*) [KS: 37];

regulaj kaj **porokazaj propraj nomoj** (asimiltaj kaj ne); ekzemplo (pri la iama 'seka leĝo en Usono'): *Male, Leibniz ne fi-kritikas / La Usonan akvomanion, / Ĉar devige ĉiu aplikas / Lian 'Limonadologion*' (implicita paronimo: '*La Monadologio*' – fama scienca studo de Leibniz); (en la korpuso de la 'ludkomunikaĵoj', kiujn kolektis S.F., propraj nomoj, ĉefe la personaj, okupis tutan kvaronon [Fiedler 2001: 588]);

barbarismoj; ekzemplo: la ĉefurbo de Hungario okaze de la 68-a UK estis ornamita per tolaĵoj kun la surskribo en esperanto kaj la hungara: *Monda Espertanto-Kongreso – Eszperantó Világkongresszus*; naskiĝis ŝerco: *ni partoprenas vilaĝ-kongreson* [ER, 1983, 9, 160].

7. La propraj nomoj estis formitaj el:

antroponimoj (= nomoj de homoj); ekzemploj: [pri Perla Martinelli]: *La perlo de la jaro* [GG, 1982, 5, 24]; *Hodiaŭ al ni alveturos bulgaro Kunĉo Valev. – Kun kiaj ĉevaloj*? [el telefonparolo de la subskribinto]; *La tutlande konata bulgara talentulino Radka Malamova –*

kiu malgraŭ sia nomo amas (implicita porokaza neologismo: Malamova kun pseŭdoradiko 'am' kaj pseŭdosufikso '-ov-') *sian publikon! – konigos sin* … [KL: 44];
toponimoj (= nomoj de geografiaj lokoj); ekzemplo: *Ŝi estis fama filmaktorino, al kiu enamiĝis… rano! Kiel en la fabeloj. Rano kun sceptro kaj trono. Rano kun numero. Kiel hotelĉambro. Nome, Rano, III-a, princo de Monsako aŭ proksimume* (implicita paronimo: Monako) [KS: 124];
titoloj de E-presaĵoj; ekzemplo: *Kaj se iam okazos, ke ankaŭ ŝi devos enŝovi paŭzon en siajn promenadojn, tiam iu… 'Sensacieca revuo', ĉiam bone informita, tuj instruos …* (implicita paronimo: Sennacieca Revuo) [KS: 176];
nomoj de esperantaj konkursoj; ekzemplo: [epigrafo al versaĵo] *nepremiita ĉe la Ploraj Ludoj* (implicita paronimo: Floraj Ludoj) [VT: 15];
nomoj de E-institucioj; ekzemplo: *La Lingva Komikado* (implicita paronimo: La Lingva Komitato) [LN, 1966, 33, 110-111];
nomoj de planedoj; ekzemplo: *La Lunon ni konkeris. Nun ni konkeru ankaŭ Uran…usonon*! ('hibrido' de Uranuso kaj Usono) [KS: 138];
nomoj de planlingvoj; ekzemplo: *Por vi ĝi* (= Esperanto – A.M.) *estas… Edzperanto*!! [VT: 30].
Ĉiuj priluditaj vortoj formaspekte diferencis pro malsameco kaj/aŭ (mal)esto de unu aŭ pluraj literoj/sonoj, liter/grafem-silab-morfem-ordo.

Notoj:
1. Tradukis ĉi tie kaj en ĉiuj aliaj lokoj, krom speciale notitaj, la subskribinto.
2. Tre detala difino de VL aspektas jene: vortludo estas lingvaĵofiguro, kiu realiĝas per koliziigo de pluraj sencoj de la sama vorto/vortkuno aŭ uzo de diversaj kombinoj de vortoj/vortgrupoj (inkluzive porokazajn neologismojn), similaj fonetike kaj/aŭ ortografie, sed malsimilaj enhave/semantike, kiuj kaŭzas kutime humuran, satiran, ironian ktp. efekton, interalie, pro intenca ripetado de vort(er)oj, detruo aŭ misformado de kliŝoj, konscia koliziigo de norma vorto kaj ĝia porokaza kripligita formo, ĝusta kaj intence misa morfemanalizaĵo, uzo de malsamĝenraj/stilaj leksemoj en la sama teksto, uzo de leksemoj en 'misaj situacioj' aŭ kun misa sintagmumo, intermikso de vorta intensionalo kun ekstensionalo. Iam en vortludoj povas esti uzataj malsamformaj vortoj kun kvazaŭsinonima/antonima signifo.
3. Ni nomos 'luda komunikado', imite al S. Fiedler, 'plej diversajn tipojn de krea lingva aktiveco' [Fiedler 2001: 585].
4. Rezigno de 'primaraj ĝuoj' malfacilas por la homa psiko.
5. Kp. la opinion de O. Revzina koncerne kialojn krei porokazajn vortojn (neologismojn): 'La rilatoj de homo kun lingvo estas formataj en la reĝimo de nelibero: homo dependas de lingvo, sed lingvo kiel sistemo de signoj ne dependas de homo. […] Sed kiel ĉiu potenco, la potenco de lingvo havas siajn malfortajn punktojn, lokojn de forglitemo'. Dum parola agado, daŭrigas ŝi, la homo povas por momentoj elliberigi sin de la lingva potenco (eble, liberigas sin la subkonscio) - kaj kreiĝas nova vorto [vd. Revzina: 305].
6. Kp. en la rusa: *А отчего пан-талоны, а не хам-купоны?* [Sannikov-1: 68].

Citita kaj referencita literaturo

Per asteriskoj estas markitaj la titoloj de E-periodaĵoj. Se la enparenteza indiko kaj la plena titolo de la periodaĵo koincidas, ĝia nomo ne estas deĉifrata ankoraŭ foje. Se eldonjaro ne estas indikita, ni metas ĝin inter parentezojn.

1.[Arnau] - Arnau. Pli ol homo, esperantisto!- Zagreb, 1996
2.[ER] - [Esperanto]* (oficiala organo de UEA)
3.[Esp-Aktuell] - Esperanto Aktuell*
4.[Fiedler] -Fiedler, Sabine. "Die B/blanke Wissenschaft" – Luda komunikado en Esperanto // Studoj pri interlingvistiko; Studien zur Interlinguistik; Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke; Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburstag. Red. Sabine Fiedler, Liu Haitao. - Dobřichovice(Praha), 2001. - P. 585-602
5.[ĜG] - GEJ-Gazeto*
6.[ĜP] - Schwartz, R. La ĝoja podio. 2-eld. - Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1975
7.[Infana mondo]*
8.[JA] - Jarlibro. – Rotterdam: UEA, 1984
9.[KKJ] - Szilagyi, F. Koko krias jam. 2-a eld. - Budapest, 1976
10.[KL] - Kongresa Libro
11.[Kruko] - Beaucaire, L. Kruko kaj Baniko el Bervalo. 2-a korektita eld. - Kopenhago, 1974
12.[KS] - Schwartz, R. ...kun siaspeca spico.- La Laguna, 1971
13.[KV] - Auld, W., Dinwoodie, J.S., Francis, J., Rossetti, R. Kvaropo. 2-a eld. - Budapest, 1977
14.[La Praktiko]*
15.[LKK] - La Kancerkliniko*
16.[LNLR]- La Nica Literatura Revuo*
17.[LodE] - La Ondo de Esperanto*
18.[Ossaka] - Ossaka, K. Plena kursolibro por japanoj. - Japana Esperanto-Instituto, (1970)
19.[Piĉ] - Piĉ, Karolo. Kritiko kaj recenzistiko en Esperanto. - Saarbrücken: Edition Iltis, 1999
20.[Revzina] - Ревзина, О.Г. Поэтика окказионального слова // Язык как творчество. Сб. статей к 70-летию В.П. Григорьева. - М.: ИРЯ РАН, 1996. - С. 303–308
21.[Sannikov] - Санников, В.З. Русский язык в зеркале языковой игры. - М., 1999
22.[Step] - Butler, Montagu C. Step by Step in Esperanto. - Chorleywood: The Esperanto Publishing Company Ltd., 1965
23.[Ŝĉerbina] - Щербина, А.А. Сущность и искусство словесной остроты (каламбура). - Киев, 1958.
24.[FVP] - Beaucaire, L. Fabeloj de la verda pigo. - Antverpeno-La Laguna: TK/Stafeto, (1981)
24.[VT] - Schwartz, R.Verdkata testamento. 3-a eld. - Aabyhøj, 1974.

Pri la aûtoro:
D-ro Aleksandro S. Melnikov (naskiĝis en 1951, ruso) diplome kaj kvalifike finis la Rostovan universitaton (kemia fakultato), Pjatigorskan fremd-lingvo-instruistan superan lernejon (angla lingvo), diplomita Ĉe-instruisto, doktoro de filologio (en la rusia sistemo "kandidato de filologiaj sciencoj", disertacio pri interlingvistika temo), adjunkto de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS), docento (en Rusio-scienca rango senpere antaŭ la plej alta en supera lernejo-profesoreco), nun laboras kiel docento (posteno-la 3-a ŝtupo el 4 eblaj en la sistemo de la supera klerigado de Rusio) ĉe akademio de agrikultura maŝinkonstruado (instruas Esperanton kaj la anglan), lastatempe verkas disertacion "Kulturologiaj aspektoj de internacia planlingvo" por fariĝi "doktoro" en la rusia sistemo (en pluraj aliaj landoj – Dr.Hab.). E-isto ekde 1965; multjara prezidinto de la Rostova E-klubo, prezidinto de SEJM (Sovetia E-Junulara Movado-la sola movada tutsovetia organizaĵo ĝis 1979), vic-prezidinto de SEU (tutsovetia E-asocio), TEJO-ekskomitatano, iamaUEA-ĉefdelegito por USSR, nuna Delegito en Rostovo.

Ni Estas Parto de la Tero

Refoje ni postlasis la kvinan de junio, la tutmondan tagon de la ekologio, sed la ekologio kaj la loĝata terglobo ade estas implikitaj en eventoj malagrablaj. La arboj kun miriga rapideco ekstermiĝas. La maroj, riveroj, lagetoj kaj subteraj akvoj ĉiutage poluciiĝas. Ĉiujare novaj specioj de la sovaĝa bestaro kaj plantaro malaperas. Poluciita aero de la urboj estas plumba kaj peza kio pli malfaciligas la spiradon de la urbanoj. Ĉijare anstataŭ funebre kantadi pri la ekologia krizo, ni elektis la oratoraĵon de "Siatel" la estro de la tribo "Dovami", kiun li eldiris kontraŭ la propono de Usona ŝtato pri la aĉetado de ruĝhaŭtulaj teroj. Kvazaŭ ĝi estas himno malĝojiga pri katastrofoj altruditaj al la ekologio. Lia elokventa kaj poemeca parolo post 150 jaroj pli ol ĉiu alia epoko por ni nuntempuloj estas plena da punktoj skuigaj. Jen partoj elektitaj:

...Kiel la homo povas aĉeti la ĉielon aŭ vendi ĝin aŭ la varmecon de la tero? Tiaj ĉi supozoj por ni estas ne konataj kaj fremdaj.

Kiam ni ne posedas la freŝecon kaj travideblecon de la akvo, kiel vi povas aĉeti ĝin de ni?

Miaj vortoj similas al la steloj, ili ne subiros. Ĉiu angulo de ĉi tiu lando por mi estas sankta. Ĉiu brilanta folio, ĉiu sablostrando, ĉiu nebulo en mallumaj arbaroj, ĉiu luma radio tra la arbaj folioj kaj ĉiuj insektaj zu-



Foto: www.hamshahri.net

madoj, en la pensoj kaj spertoj de mia popolo estas sanktaj. La sukoj fluantaj tra la vejnoj de arboj, kunportas memoraĵojn pri la ruĝhaŭtuloj.

Niaj mortintoj neniam forgesas ĉi tiun sensacian landon, ĉar la tero estas la patrino de la ruĝhaŭtulo.

Ni estas parto de la tero kaj ĝi estas parto de ni. La bonodoraj floroj estas niaj fratinoj. Gazeloj, ĉevaloj kaj la aglo granda estas niaj fratoj. Rokoj altaj, herbejoj plenakvaj, la varmecon de la homa ekzisto, kaj la poneoj, ĉiuj estas el la similaj familioj.

Ni pripensas pri via aĉet-propono rilate al nia lando, sed tio ne estos simpla, ĉar tiu ĉi lando estas sankta por ni. La ekzisto de la arboj igas nin ĝojaj. Mi ne scias; nia vivmaniero kaj la via diferncas. La akvo diafana kaj fluanta en la urboj kaj riveroj, ne estas nur akvo, sed ĝi estas ankaŭ sango de niaj antaŭaj generacioj. Se ni vendos nian landon, vi devas scii, ke ĉi tiu lando estas sankta kaj vi instru ankaŭ al viaj infanoj ke nia lando estas sankta.

Mi scias, ke blankulo ne komprenas alian vivmanieron. Ĉi tiu parto de la tero por li similas al ĉiu alia parto, ĉar li estas fremda kun ĝi. La tero ne estas lia frato. Kiam li konkeras iun terpecon, li ankoraŭ galopas antaŭen. Li postlasas la tombojn de siaj prapatroj indiferente. Li - la blanka viro - kun sia patrino, la tero, kaj kun sia frato, la ĉielo, traktas tiel kvazaŭ ili estas objektoj porteblaj kaj rabindaj.

Mi ne scias; nia vivmaniero kaj la lia diferencas. Viaj urbaj pejzaĝoj ofendas la okulojn de ruĝhaŭtulo. En la urboj de blankhaŭtuloj ne ekzistas trankvileco kaj la kialo eble nur estas tio ke mi ne estas edukita kaj dresita kaj ne povas kompreni!

Kiam oni ne povas aŭdi la kanton de la birdoj aŭ la kverelon de la ranoj en marĉo

dumnokte, kian signifon havos la vivo?

Mi estas ruĝhaŭtulo kaj ne povas kompreni tion. Ruĝhaŭtulo amas la zumkanton de la vento; la vento, kiu karesas la surfacon de l' lageto. Ruĝhaŭtulo amas la bonodoron de la vento; la vento, kiu jam puriĝis sub la pluvo tagmeza aŭ peziĝis de aromo de l' pinarboj. Sed se ni vendos nian landon al vi, ne forgesu vi, ke la vetero por ni estas tre kara kaj valora.

Mi estas viro nedresita, kiu alian vivmanieron ne konas. Ni jam vidis milojn da bizonoj masakritaj fare blankuloj el la trajno pasanta. La bizonojn ni ĉasas nur por nutri nin kaj pluvivivi.

Kio estus la homo sen la bestoj? Se la bestoj ne ekzistus la homo estus mortinta en izoleco de sia animo.

Ĉio kio okazas kontraŭ la bestoj, baldaŭ kaptos ankaŭ la homon, ĉar ĉiuj objektoj kaj estaĵoj estas en striktaj rilatoj kun unu la alia.



Elahe Ŝadidi

Ĉio farita kontraŭ la tero, ĝenos ankaŭ la filojn de la tero. Vi instruu al viaj infanoj, ke la tero sub ilia piedo estas la cindro de niaj prapatroj, por ke ili rekonu la respekton al la tero. Al ili diru, ke la tero plenas de spiritoj de niaj antaŭaj generacioj.

Ni sicias ke la tero ne apartenas al homoj, sed la homo apartenas al la tero. Ni scias ankaŭ tion, ke ĉiuj objektoj kaj estaĵoj interrilatas forte, kiel la sango kio estas komunaĵo inter la familianoj. La tuta universo estas unueca tutaĵo.

La homo ne estas la kreinto de la vivreto, sed li nur estas ereto de ĝi. Kiam vi damaĝas tiun ĉi reton, tio estigos plagon kontraŭ vi mem.

Ni pripensos pri la propono de la blanka viro pri la vendo de nia lando, sed mia popolo demandas min: kion postulas la blanka viro de ni? Kiel oni povas aĉeti la ĉielon, la varmecon de la tero, aŭ la rapidecon de la paŝoj de antilopoj? Kiel ni povas vendi ilin al vi, kiel vi kapablas aĉeti ilin de ni? Ĉu vi povas fari kion ajn vi deziras kontraŭ la korpo de la tero? Nur tiupretekste ke la ruĝhaŭtulo stampas paperpecon kaj donas ĝin al vi?

Ni pripensos pri via propono. Ni sicas, ke se ni ne vendos nian landon, sendube la blanka viro alproprigos ĝin al si perforte de siaj armiloj, sed ni estas ne dresitoj. Ni pripensos pri la elmigrado al kampadejo. Ĉu ni tiu-fore vivos en paco?

Niaj infanoj vidis siajn patrojn venkitaj kaj humiligitaj. Ili post la malvenko en la milito pasigas la tagojn vane. Ili venenigos sin per dolĉaj manĝajoj kaj fortaj trinkaĵoj. Plu neniu infano restas de nia granda etno por plori sur tombo de unu nacio; la nacio, kiu komence estis tiom forta kaj esperoplena.

Ni scias ion, nia dio estas la ununura dio. Tion la blankulo eble iam eltrovos. Eble vi supozas, ke vi povas posedi ankaŭ la dion samkiel vi volas ekposedi nian landon? Sed vi ne kapablas fari tion. Li estas la dio de ĉiuj homoj. Tiu ĉi lando estas valora por la dio. Detrui la teron signifas malrespekti la kreinton.


Ankaŭ la blanka generacio iam neniiĝos de sur la tero - eble pli rapide ol la aliaj gentoj.

Blankulo, pli galopu, venenigu vian kuŝejon. Alvenos nokto, kiam vi enteriĝos en ŝlimejon kiun vi mem estigis!

Fonto: ***"Ni Estas Parto de la Tero"*** Tradukis persen H. Gadir-neĵad, Alefba eldonejo, citita en: taĝĵurnalo Hamŝahri (Samurbano), N-ro 3070, 8 Junio 2003, p. 5.

Esperantigis: (f-ino) **M. Fahmi**
fahmi@sabzandishan.com

Internacia Fotokonkurso



Post kvin sukcesaj konkursoj (1998, 1999, 2000, 2001, 2002) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la sesa *Internacia Fotokonkurso*. La konkurso ne estas ligita al deviga temo.

En la konkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10×15 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando). La fotoj devas atingi la sekretarion antaŭ la 15a de decembro 2003. La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj.

Tripersona juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1a premio: 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* 2004.

2a premio: 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* 2004.

3a premio: abono de *La Ondo de Esperanto* 2004.

Specialan premion (libroj de *Sezonoj* kontraŭ ekvivalento de 50 eŭroj) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto. Ĉiu premiito ricevos diplomon. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2005 uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

Libro-prezento

Hamzeh Ŝafii hamzeh@sabzandishan.com

Dum la Pasinta monato mi finlegis du libr(et)ojn : « ***Gerda Malaperis*** » de Claude Piron kaj « ***La Nekonata Konato*** » de Douglas P. Boatman. Ambaŭ Libroj estas aventur-plenaj, mistikaj rakontoj kiuj altiras la leganton pludaŭri kaj senĉese legi la libron ĝis la fino.

«***Gerda Malaperis***» celas plueduki lingvo-lernantojn en progresa nivelo, tamen ĝi estas tre bone aranĝita kaj povas servi kiel detektiv-romano kvankam mallonga. Mi rekomendas ke ankaŭ vi legu ĝin se vi ankoraŭ ne faris tion. Fine de la libro estas anoncita ke ekzistas intenca eraro en la romano por ke leganto pli atente legi kaj trovi ĝin. Mi mem ne atentis tiun rimarkon antaŭ ol legi la libron kaj ne serĉis ĝin poste. Do, se vi decidis legi la libron, estus pli interese ke vi trovu ankaŭ la eraron.

«***La Nekonata Konato***» estas 122-paĝa libreto kiun mi legis dum kvartagoj survoje inter la laborejo kaj la hejmo en buso aŭ subtera trajno. La libro estas facila kaj intereso-leveka por progresantoj kaj perfektiĝantoj de Esperanto. Mi legis la kvaran eldonon (1977) de la libro kies unua eldono aperiĝis en 1932 pere de ***Heroldo de Esperanto*** (**HdE**). Sur la malantaŭa kovril-paĝo estas kopio de 4-a numero de Bibliografia Gazeto, kies redaktoro estis K. Kaloscay. La gazeto prezentas la libron ĉitiel :

«…*la violkolora, malhela kovrilo de la Nekonata konato tuj vekas la interesiĝon, ne parolante pri la titolo, kiun mi trovas vere feliĉa. La subtitolo sonas : mistera rakonto, kaj la mistero komenciĝas jam sur la titolpaĝo… Poste oni komencas foliumi la libron kaj ... oni ne formetos ĝin antaŭ plena ellego. ...*»

«*Ŝajnas al mi, ke en la ventfrape rapida, glata, agrabla, rutina, facila stilo eble tie kaj tie ĉi troviĝas makuleto : ŝajnas al mi, sed mi ne scias ! La libro tiel forte kaptis min, mi tiel avide glutis ĝiajn paĝojn, ke mi ne povis atenti pri tio*»★

DAMAVAND

Alta kaj Fiera, Simbolo de Irano

M.Reza Torabi torabi@sabzandishan.com

Damavand estas la tegmento de Irano. La montopinto estas historie scenejo de praaj herooj de la antikva Persio kiel ***Ĝamŝid***, ***Rostam*** kaj ***Ferejdun*** kiujn priskribis la plej granda irana epopeisto ***Abolgasem Ferdoŭsi*** (940?-1020?) en sia grandioza kaj superordinara poemlibro **Ŝahname** (*Libro de Reĝoj*). Damavand estas la nacia simbolo de Irano kaj ekzistas tre multaj organizoj kiuj por prezenti sin/siajn produktojn utiligas la bildon de ĉi tiu fama montopinto: eble plej evidentajn oni povas trovi sur bank-notoj, monbiletoj, kreditkartoj aŭ … aŭtobusbiletoj. Multaj turistoj kaj alpinistoj el la tuta mondo kredas ke Damavand estas la plej bela konusforma montopinto de Azio. Tio estas la plej alta montpinto de Irano. Ĝi situas norde de la Alborz-ĉenmontaro disponiganta ebenaĵojn plen-florajn kaj deklivojn verdajn. Se oni intencus supreniri de la vilaĝo Rineh, estas 8-hora marŝado de la startejo *Gusfand-Sara* (ŝaf-ejo) kaj 8-hora grimpado de la tria ŝirmejo al la glora pinto de Damavand. Monto Damavand 5671 metrojn alta, estas 100km for de Tehrano kaj 75 km for de la Kaspia Maro. Ekzistas multaj skribitaj mitoj pri ĉi tiu monto en la irana historio. Ekzemple, oni diras ke ekzistas malliberigita monstro ĉe la pinto de la monto. La deklivoj kaj intermontoj de ĉi tiu altaĵo estas plenaj de vulkana lafo. Cetere, estas kelkaj malgrandaj vulkanaj kavoj apud la pinto el kiuj sulfurgasoj kutime eliĝas. Proĝia konusformo, grimpado estas ebla de ĉiuj flankoj, sed la konataj vojoj por atingi la pinton estas naŭ. La plej facila kaj ĝenerala estas la norda vojo. Ekzistas kvar ĉefvojoj kaj ĉiu el ili havas malsaman karakteron. Suda vojo estas la plej normala vojo sur kiu troviĝas unu ŝirmejo ĉe altitudo 4100m. La norda vojo disponigas du ŝirmejojn: la unua ĉe 4000m altitudo kaj la dua ĉe 5000m. Okcidentaj vojoj havas po unu ŝirmejon ĉe altitudo 4550m kaj la nordorienta vojo havas unu ŝirmejon ĉe 4800m. Ĉe la montopinto ekzistas superŝutita flaveca sulfurika elstaraĵo kaj la diametro de la kratero estas pli ol 180 metroj. Alborz montaro el kiu la

Faktoj pri Damavand	
Diversaj nomoj	Demavend Kuh-e Damavand Damavand
Alteco (futoj)	18602
Alteco (metroj)	5670
Loko	Alborz(Elburz) Montaro, norde de Irano, sude de Kaspia maro
Latitudo	35ƒ 57' 21" N
Longitudo	52ƒ 06' 31" E
Plej bona tempo por grimpado	Julio, Aŭgusto, Septembro
Jaro de unua sukcesa grimpado registrita	1937
Unua registrita grimpisto	W.T. Thomson
Vulkana stato	Aktiva
Plej lasta erupcio	Nenio registrita
Oportuna grimpcentro	Raineh (vilaĝo ĉe la suda bazo de la monto)
Plej proksima grava flughaveno	Tehrano, Mehrabad-flughaveno

monto Damavand estas la plej alta pinto, estas ĉeno laŭ la montaroj de Alpoj kaj Himalajo, sed Damavand ne konektiĝas al iu alia monto de Alborz montaro. Oni taksas tion, ke ĉi tiu vulkano aĝas pli ol 2 milliard-jaroj. Pro ĝia aparta lokiĝo ĉe la Kaspia maro norde kaj dezerto sude, ĝi havas tre specialan klimaton, kiu malfaciligas la vivadon. Ventoj ĝenerale blovegas de okcidento kaj nordokcidento kune kun humideco kaj pluvo. La montopinto kaj la deklivaĵoj preskaŭ ĉiam estas kovritaj de neĝo.

La unua sukcesa grimpado registrita al ĉi tiu montopinto devenas de 1900. Dum tiu jaro, irana geografiisto, sukcesis alpintiĝi. De tiam ĝis 1937 ne estas registrita grimpado. Sed en la 1940-aj jaroj la grimpoj estis multobligitaj kaj novaj vojoj estis malfermitaj. Je la fino de 50-a jardeko, multaj eksterlandanoj estis allogitaj kaj interesitaj supreniri Damavandon. Kvankam Damavand ne erupciis de antaŭ 100,000 jaroj, kaj estas neaktiva, tamen la geologiistoj ne povas esti certaj ke ĝi denove ne reaktiviĝos kaj pro kelkaj kialoj, laŭ iliaj vidpunktoj, eblas ke Damavand-vulkano reaktiviĝu. Unu el la kialoj estas tio, ke el la vulkano ankoraŭ fluas varma mineral-akvo: fakte ekzistas multaj fontoj ĉirkaŭe de ĝi. Ĉi tiuj mineral-akvoj allogas homojn kiuj kredas je ĝia resaniga potenco kaj alvenas por akvotrapio pere de la fontakvo. Sur Damavand deklivaĵoj kreskas diversaj herboj kaj sovaĝaj tulipoj kaj papavetoj★

Esperantistoj sur la pinto de Damavand!



De antaû 6 jaroj iranaj geesperantistoj organizas supreniran programon al Damavando. Lastfoje-kio estis la 3-a tia okazaĵo– el 19-kapa grupo kiun organizis Irana Esperanto-Centro (IRECO) je la 1-a de augusto 2003, 14 geesperantistoj sukcesis supreniri montopinton Damavando kaj tria-foje Esperanto-flagon karesis Damavand-vento super tegmento de Irano!
En la mezo de la unua vico videblas la respondeca direktorino de nia revuo kiu ĉi-jare unua-foje sukcesis supreniri la monton.